

DAILY MAIL

BILD-LIBRO

PRI

BESTOJ

LIAM AULD

Unufingraj
melodioj

Ivo Lapenna



RETORIKO

VIRINO
ĈE LA LANDLINO

SUB LA JUGO

IVAN VAZOV

Ĉina Antologio 1949-1959

SONĜE SUB POMARBO

ESPERANTO

DECEMBRO 1961

esperanto

DECEMBRO 1961

5 4 a J A R O

REVUO INTERNACIA

N-RO 673 - (12)

Fondito : H. HODLER

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktoro : W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa. (Clackmannanshire), Skotlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-2, Nederlando, Telefono : (010) 128313. Ĝirkonto : 378964 TELEGRAMADRESO : ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-1.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesitaj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Jara abono (1961) : 11,50 gld. (kun membreco kaj jarlibro 15,— gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld, 1/2 paĝo 64,— gld, 1/4 paĝo 32,— gld, 1/8 paĝo 16,— gld, 1/16 paĝo 8,— gld.

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto kaj aganta prezidanto, 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Prof. D-ro Hideo Yagi, vic-prezidanto, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Norman R. Smith, estrarano pri kulturaj aferoj, 75 South Ealing Road, South Ealing, London W 5, Britujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri eŭropa lingvo-kampanjo, Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

A. Rajski, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, Odyńca 3/5, Warszawa, Pollando.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro : ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7, Zürich 57, Svislando.

LA FRONTPAĜA BILDO :

La tago de la libro, la 15an de decembro. 1961.

Enhavo

Amatoroj aŭ profesiuloj ?	201
Okaze de la Zamenhof-tago	203
Esenca tasko	204
Kolektanto de ĉielarkoj. Tibor Sekelj	205
Esperanto kiel literatura lingvo IV	208
Aktuala komentario	215
Nacia Esperanto-muzeo kaj biblioteko	217
Rememorencoj pri unu prelegvojaĝo	218

Rubrikoj

Ricevitaj libroj	204
Novaj libroj	211
47a Universala Kongreso	212
Radio	212
CED	213
Saka rubriko	214
La Internaciaj Konkursoj	215
Nia forumo	216
La Juna Vivo	219
Tra la mondo	220
Esperantista vivo & Nekrologo	221
Oficiala informilo	221

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare tajpitaj en korekta Esperanto. Oni skribu sur nur unu flanko de la papero (prefere en normformato A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto. Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn supersignojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

AMATOROJ AŬ PROFESIULOJ ?

En "Juna Germana Esperantisto" (Germana Esperanto-Revuo, okt., 1961) aperis nesubskribita artikolo sub titolo "Ĉu junularo kontraŭas arton?", kies anonima aŭtoro starigas kelkajn opiniojn, kiuj meritas pli vastan kaj detalan pritrakton. Unue, mi volas citi la ŝlosilajn partojn el la artikolo; mi numerigos ilin por pli facile aludi al ili poste :

(1) Ŝajnas al mi, ke la aŭtoroj de Esperanto-poezio estiĝis poetoj nur post la lernado de Esperanto kaj en sia nacia lingvo tute ne pretendas esti verkistoj aŭ poetoj.

(2) Bonvolu bone memori, ke s-ro mag. William Auld diris, ke en Esperanto ankoraŭ ne ekzistas iu originala vere elstara romano, kiu laŭ kvalita mezuro egalus naci-lingvan 'produkton'. Tiun konstaton mi riskas — eble iomete facilanime — plivastigi kaj apliki al ĉiuj Esperanto-literaturaĵoj.

(3) Kaj kion diri rilate la Esperanto-poemojn? Iu esperantisto verkas poemon, iu gazeto esperantista publikas ĝin; kelkaj esperantistoj verkas poemojn, komisiono elektas el inter la amaso de poemoj kaj kvazaŭaĵoj; ja necesas trovi ion laŭdire brilan kaj eksterordinaran ankaŭ inter la esperant-lingvaj produktoj, ĉar ni nepre devas pruvi ĉiutage, ke Esperanto estas taŭga por literaturo! Ĉu ni ne fakte jam bredas Esperanto-poetojn? Ni ja jam troigas en nia ŝajn-bezono al poezio kaj Esperanta literaturo! Ĉu ne estas simpla konsekvenco el tiu poet-bredado, ke verkoj en la Internacia Lingvo tre simple estas presataj kaj supozataj 'grandiozaj kaj elstaraj eldiroj' de internacia popolo? Do, amatoroj estiĝas kvazaŭ-profesiuloj.

(4) Se ni ĉiuj pravas postulante la pruvon, ke Esperanto ankaŭ taŭgas por ĉia literaturo, tiuj personoj, kiuj plej bone regas la lingvon kaj en aliaj kampoj estas kompetentaj, do kleruloj, traduku la naci-lingvajn verkojn el diversaj jarcentoj, faru science kritikajn komparojn inter la originalo kaj la Esperanto-traduko, sed ĉesu verki pseŭdo-artaĵojn, kiuj nenion pravas al ne-esperantistoj kaj en la plimulto de kazoj kaŭzas malaproban kap-skuon ĉe esperantistoj. Esperanto estu peranto inter la popoloj ankaŭ en literaturo, sed **propran originalan literaturon beletran ni ne bezonas!**

Unue, estos bone diri kelkajn vortojn pri la terminoj "amatoro" kaj "profesiulo". En ĉiu fako povas spertiĝi ambaŭ specoj da persono; la diferenco inter ili estas difinata tiel, ke la profesiulo perlaboras sian panon per praktikado de la koncerna fako, la amatoro tion ne faras. Sed ĝuste pro la profesieco de la profesiulo, oni apriorie emas supozi, ke li pli perfekte regas aŭ konas sian fakon ol la amatoro, kiu siaflanke povas dediĉi nur parton el sia tempo kaj energio al la koncerna fako (kvankam ekzistas ankaŭ riĉaj amatoroj, kiuj entute ne bezonas perlabori sian panon — ni pensu ekzemple pri iuj usonaj sportistoj — kaj tiel povas dediĉi sian tutan vivon al tiu fako). Ni konsentas, ke, kiel tute ĝenerala regulo, tiu supozo estas trafa, kvankam sur multaj kampoj, precipe artaj kampoj, kiel ekzemple fotografio, la plej talentaj amatoroj atingas nivelon multe super la profesia meznivelo

— ĝuste pro tio, ke ili povas dediĉi pli da tempo al atingado de pli bonaj rezultoj. Bona profesia fotisto fakte plendis al mi lastatempe, ke se li disponus pri pli da tempo li povus multe plibonigi siajn produktaĵojn, sed, li diris, "por profesiulo, tempo kostas monon"! Ni prenu ankoraŭ unu-du ekzemplojn. Zamenhof estis profesia okulisto kaj nur amatora lingvisto; se li atendus la laboraĵojn de la profesiaj lingvistoj, la solvo de la lingva problemo ankoraŭ longe mankus al ni! Sed li ne estas en tiu senco unika. Michael Ventris, la deĉifrinto de la t.n. "Linear B"-skribaĵoj (skribaĵoj de pra-Kreto), estis profesia arĥitekto, kaj nur amatora lingvisto. Herschel, eble la plej genia el ĉiuj astronomoj, estis amatoro — kaj ne riĉa amatoro, ĉar li devis samtempe perlabori sian panon per orgenludado. Ankaŭ de alia flanko oni povas rigardi la problemon. En Britujo povas esti profesia aktoro nur tiu, kiu posedas rajtigilon de la aktora sindikato; tamen inter la multegaj posedantoj de tia rajtigilo troviĝas ankaŭ kelkaj, kiuj nur fuŝe praktikas sian fakon! Aliflanke mi persone konas tre talentan amatoran aktoron, kiu plurfoje ricevis konkretajn proponojn fariĝi profesia televidaktoro — sed preferas la sekurecon de instruista kariero kun posta pensio. Li tamen estas minimume tiel kapabla, kiel iuj profesiuloj.

Tiom pri ĝenerala principo. Oni juĝu la fakulon, ĉu amatoran ĉu profesion, laŭ lia kapableco kaj laŭ la rezultoj de lia fakagado, kaj ne laŭ la simpla demando, ĉu aŭ ne li volas aŭ sukcesas akiri eĉ modestan enspezon pere de ĝi. Starigi la kriterion sur ekonomia bazo ĉifoje ŝajnas al mi fundamente erara. (Ĉu fakte la plej genia pentristo estas ĉiam tiu, kiu plej kontentige enspezas? . . .)

Nun mi permesas al mi komenti laŭvice la numeritajn citaĵojn el nia anonima junulo.

(1) Ne estas tute klare, kial poeto en Esperanto devas esti poeto ankaŭ en alia lingvo (ĉu poeto en la angla ial devas esti poeto ankaŭ en, ni diru, la pola?) Ŝajnas al mi, ke ĝenerale verkisto preferas verki en unu lingvo, kaj tio sufiĉas al li, eĉ kiam li posedas pli ol unu lingvon. Kaj tamen, kvankam mi neniam faris esploron pri la demando, mi hazarde scias, ke Marjorie Boulton eldonis ĝisdate preskaŭ 20 librojn — inkluzive de poemaroj — en la angla lingvo, kaj ke Reto Rossetti eldonis minimume du librojn (eble pli) en nacilingvo. Mi scias krome, ke "Kredu min, sinjorino", originale verkita en Esperanto, furoris en hungara traduko. Mi mem estis 13-jara, kiam mi eklernis Esperanton, do estas malfacile kompreni, kiel mi povus esti verkisto aŭ poeto antaŭ tio. Cetere, mia elekto

de Esperanto anstataŭ nacilingvo estis tute konscia, kaj mi povis fari ĝin ĝuste pro tio, ke mi havis alian rimedon por perlabori mian panon — mi sciis, ke per esperanta verkado mi ne povos enspezi, eĉ se mia talento meritis tion. De tiam mi **nur unu fojon**, en 1952, proponis originalan angla-lingvan poemon al redaktoro de tiam aperonta, nun delonge aperinta, kolekto. Li skribis al mi:

"Kara s-ro Auld,

Mi ŝuldas al vi konsiderindan pardonpeton pro tio, ke mi retenis tiel longe (vian poemon) kaj fine faris nenion pri ĝi. Mia kunredaktoro kaj mi ambaŭ tre multe ŝatis la poemon, sed pro la sentemeco kaj aglinio de la subvenciintoj de la antologio, ni pensis, ke eble estos malfacile enirigi ĝin inter aliaj akceptitaj verkoj. Fine la drasta neceso mallongigi tute malebligis eĉ tion. Mi estas malfalse bedaŭra. Se tio ĉi prezentas la ĝeneralan nivelon de viaj verkoj, mi supozas, ke redaktoroj ĉiam volonte ricevas ilin.

Via sincere" (1)

Ŝajnas al mi, ke tiu letero, precipe ĝia lasta frazo, donas indikon pri mia nivelo sur la rezignita nacilingva kampo. Sed kial verkisto en Esperanto devas sukcesi ankaŭ sur nacilingva kampo, por ke oni estimu liajn esperantajn verkojn — nu, tio restas mistero.

(2) Se nia aŭtoro volis citi min, kiel aŭtoritatulon, estas bedaŭrinde, ke li ne citis min korekte. Mi diris, ke en Esperanto ankoraŭ ne ekzistas originala romano, kiu laŭ kvalita mezuro egalas al la dudek plej bonaj nacilingvaj romanoj de nia jarcento; kaj mi emfazis, ke ankaŭ la granda plimulto el la amase aperantaj nacilingvaj romanoj ne havas altan artan valoron. Sed, se mi estas citinda aŭtoritatulo, mi evidente estas citinda (eĉ erare) nur kiam mi mallaŭdas, ne kiam mi laŭdas; ĉar mi diris tute klare, ke, kvankam Esperanto ankoraŭ postrestas sur la kampoj de romano kaj dramo, sur iuj aliaj kampoj ĝi egalas al la nacilingvaj literaturoj de nia jarcento, kaj tute elstare tio estas vera sur la kampo de nia poezio. Tio estas pretendo, kiun mi argumentis, kun dokumentoj en la mano, en diversaj lokoj, kaj mi ne intencas fari la argumentojn denove ĉi tie. Sed kiu estas nia juna sendokumenta kritikinto? — nu, laŭ la redakcia prezento, li estas "junulo, kiu ne estas superentuziasma art-adepto, sed nur tutsimple ŝatas aŭ ne ŝatas iujn artaĵojn". Certe, li ne ŝatas esperantajn artaĵojn!!

(3) La logikfadeno en tiu ĉi alineo ne estas facile trovebla. Se mi bone komprenas: se esperantisto (amatoro) verkas poemon kaj redaktoro aperigas ĝin, la amatoro fariĝas tiel kvazaŭ-profesiulo (nur "kvazaŭ", ĉar la redaktoro ne pagis al li); sed se anglo (amatoro) verkas poemon kaj redaktoro aperigas ĝin, la amatoro fariĝas tiel vera profesiulo

(1) Eble por kelkaj legantoj, kiuj ŝatas tiajn historietojn, estos interese sciigi, ke la koncerna poemo estis unua ellaboro de kelkaj konceptoj, kiuj poste trovis sian plenumiĝon kiel "La Infana Raso". Dum mallonga tempo mi hezitis, ĉu mi verkos tiun poemon angle aŭ esperante; Esperanto venkis en mi eĉ antaŭ ol mi sendis la angla-lingvan provaĵon al la antologio.

(versajne ĉar la redaktoro — kelkfoje, sed tute ne ĉiam! — pagis al li la prezon de 200 cigaredoj). Alia diferenco inter la du kazoj ne vidiĝas el la citita alineo. Sed ni reverku tiun alineon: "Kaj kion diri rilate la anglajn poemojn? Iu anglo verkas poemon, iu gazeto angla publicas ĝin; kelkaj angloj verkas poemojn, redakcia komitato elektas el inter la amaso de poemoj kaj kvazaŭaĵoj; ja necesas trovi ion kulturan kaj imponan ankaŭ inter la poeziaj produktoj, ĉar oni nepre devas pruvi ĉiutage, ke angla kulturo ankoraŭ estas vivanta . . ." Kia esenca diferenco? Mi ne komprenas.

Sed jes, nun mi komprenas. La esenca diferenco estas evidente la **lingvo**, en kiu la poemo estas verkita. "Profesia" poeto estas tiu, kiu verkas nacilingve, "amatora" poeto estas tiu, kiu verkas en Esperanto. Jen la kriterio de nia juna ne-superentuziasma art-adepto: ne la verko, sed la lingvo, en kiu ĝi estas verkita. Mi komencas suspekti, ke, por li, verkoj en lia nacilingvo estas eĉ pli profesiaj ol verkoj en la aliaj naciaj lingvoj

(4) Tradukoj, jes — "sed propran originalan literaturon beletran ni ne bezonas!" Ho, Piĉ — al vi estas respondite: oni ne bezonas vin! (Vd. "Esperanto", julio-aŭg. 1961, p. 126). Piĉ, per unu bato vi frakasis la tradukojn; jen nia amiko ekstermas la originalaĵojn! Ni restas tute sen literaturo Tiom pli bone por nia lingvo, ĉu ne?

Sed kion ni rajtas konkludi el ĉio ĉi? Ni rajtas konkludi, unue, ke nia juna amiko ne trovas en la esperanta literaturo tion, kion li mem ŝatas. Sed ni ne scias, kian literaturon li efektive ŝatas; ni scias nur, el la mankoj de lia artikolo kaj el lia propra konfeso, ke li havas nenian "profesian" intereson pri literaturo, kaj sekve apenaŭ kapablas fari "**science kritikajn komparojn**" inter esperantaj verkoj kaj nacilingvaj verkoj, kiel jam faris pli ol unu "profesiulo" (vd. ekz-e en la "Memorlibro", k.a.). Ŝajnas tute evidente, ke lia opinio devenas de — eble senkonscia — **subtakso de la lingvo Esperanto**. Oni ricevas fortan impreson, ke, por li, Esperanto estas **nature** malsupera al la naciaj lingvoj; ke ĝi ne nur ne havas, sed **ne rajtas havi** literaturon (kp. para 4). **Tial** (vd. para. 1) verkinto en Esperanto estus estiminda nur se samtempe li estus sukcesa verkisto en iu nacilingvo. Al li eĉ ne venas en la kapon, ke talenta verkisto povus konscie **elekti** Esperanton kiel sian solan verklingvon — aŭ ĉar li kredas pri la fundamenta gravegeco de la internacia lingvo kaj volas labori **por ĝi en ĝi**, aŭ ĉar li persone trovas Esperanton supera literatura instrumento kompare kun la rigidaj naciaj lingvoj, aŭ pro ambaŭ kune aŭ aliaj motivoj. Al multaj homoj Esperanto donas ion nepre necesan al ĉiu serioza verkisto — direkton, motivigon kaj ideologion en mondo, kiu alie ofte ŝajnas ĥaosiĝinta kaj freneziga. (Ĉi tie mi ne diskutas, ĉu tiaj personoj "pravas" aŭ "malpravas": mi nur konstatas ilian ekziston). Ili ne rilatas al la internacia lingvo tiel diletante kiel, ekzemple, nia juna

OKAZE DE LA ZAMENHOF-TAGO



Nia bildo montras ŝtonmonumenton al D-ro L. Zamenhof en la kuracloko DUSZNIKI (pli frue : BAD REINERZ en Malsupra Silezio). Antaŭ aŭ dum la lasta milito la ŝtonego, por ĝin savi de eventuala detruo, estis forigita el la urbeto, kaŝita kaj bone maskita en profunda arbaro. Nur post la milito, en 1945, trovis ĝin arbaraj laboristoj, kaj la pola urbeŝtaro de Duszynki veturigis ĝin kaj starigis ĉe la ĉefa strato en la kuracloko. Estus in-

terese ekscii ion pri la historio de la monumento, kaj pri tio, kiu kaj kiamaniere savis la monumenton dum la tempo, kiam furiozis la hitlerana teroro. Tiu heroo ago pravas ja, ke la interna ideo de Esperanto profunde vivigadis homojn, kiuj ne timante morti kuraĝis tion fari. **KIUJ ILI ESTAS? ĈU ILI ANKORAŬ VIVAS?** Se iu scias ion pri la historio de la monumento, li estas tre kore petata skribi al : Pola Esperanto-Asocio, WROCLAW, ul. Dubois 3, Pollando.

anonimulo. Laŭ li, cetere, nia originala literaturo "nenion pravas al neesperantistoj". Zamenhof havis alian opinion, sed ni lasu tion : la opinioj de Zamenhof hodiaŭ ne ĝuas, en kelkaj rondoj, la iaman aŭtoritaton — eble nia juna amiko estas unu el tiuj, kiuj komprenas la internacilingvan aferon pli bone ol Zamenhof, kiu finfine estis nur "amatoro". Al li mi preferas respondi nur, ke al neesperantistoj ĝi pravas minimume — sian ekziston. Kaj se, kiel nia amiko, ili preferas juĝi ne konante ĝin, ĝi tamen, per sia floranta ekzisto, konstante atestas la vivantecon kaj universalecon de Esperanto. Kaj se ĉe esperantistoj ĝi "kaŭzas

malaproban kapskuon", mi povas nur miri pri la masohismo de tiuj obstinuloj, kiuj daŭre aĉetas kaj legas ĝin. Al ili mi direktas, en tiu ĉi tradicia "Tago de la Originala Esperanto-Literaturo", mian dankon kiel originala verkisto, kaj la esperon, ke per sia daŭra kuraĝigo ili helpas pliproksimigi la tagon, kiam niaj aŭtoroj ricevos sian **justan** lokon inter la aliaj. Al mia juna amiko mi konsentas la rajton malŝati, se li deziras, la literaturon de Esperanto; sed mi konsilas al li resti publike ĉe temoj, pri kiuj li estas kompetenta — se li volas, **profesie kompetenta**.

William Auld

ESENCA TASKO

En la lastaj monatoj mi havis la okazon denove partopreni kelkajn gazetarajn konferencojn aŭ esti intervjuita rilate la Internacian Lingvon: en Londono antaŭ la Kongreso, en Harrogate, en la Brita Televido, en Danlando dum la septembra prelegvojaĝo. Kvankam en multaj kazoj la demandoj estis kleraj kaj inteligentaj, tamen plurfoje ili malkovris, ke la demandinto evidente havis nenian aŭ nur tre nebulan, konfuzan kaj eraran ideon pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj ĝenerale, pri la strukturo kaj ĝisnunaj atingoj de la Internacia Lingvo, pri la fundamentaj celoj de la Esperanto-Movado. La ignorado de elementaj faktoj estis kelkfoje vere ŝoka. Ĉio ĉi, malgraŭ la fakto, ke sendube la informado pri Esperanto en la lastaj jaroj multe progresis kaj plue progresas kvante kaj kvalite!

Ne estas eble ĉi tie detale analizi ĉiujn aspektojn de tiu ignorado kaj antaŭjuĝoj — tio estos farita dum aparta kunveno en Frostavallen post la U.K. en Kopenhago — sed necesas jam nun atentigi pri la du ĉefaj eraroj, kiuj obstaklas aŭ kelkloke eĉ malebligas la pluan disvastigon de la lingvo. La unua eraro — mi preferus ĝin nomi antaŭjuĝo — estas la falsa, sufiĉe ĝenerala opinio, ke Esperanto ne estas plenvalora lingvo, sed iaspeca surrogato

de lingvo, kapabla por esprimi nur la plej elementajn pensojn, sed ne sufiĉe ellaborita por scienca aŭ literatura kreado. La dua eraro fontas el la falsa rigardado al la Esperantismo kiel movado kun sektecaj trajtoj. Oni ne povas nei, ke inter la miloj da esperantistoj troviĝas ankaŭ kelkaj stranguloj (kiel, cetere, en ĉiu ajn socia grupo), kiuj per siaj sinteno, fanatikeco kaj nereseriozeco povis krei impreson de sekteco, sed estas nepardonbla eraro senpripense aŭ eĉ malice ĝeneraligi la esceptojn, feliĉe nun jam tre maloftajn.

Tiujn du antaŭjuĝojn necesas kontraŭbatali plej energie. Tio estas unuavice la tasko de la informaj fakoj kaj de la multnombraj kunlaborantoj de la Informa Fakoj de U.E.A., sed en tiu grava laboro povas helpi ĉiu Esperanto-organizaĵo kaj eĉ ĉiu unuopa esperantisto. Se oni efektive ĉie tra la mondo sisteme agos laŭ la ideoj, kiujn entenas la Principaro de Frostavallen, certe ni sukcesos tre baldaŭ detruigi la du antaŭjuĝojn kaj tiamaniere malfermi la pordon por la plua progresado de Esperanto en ĉiuj medioj, sed tute speciale en tiuj de scienco, artoj, edukado kaj kulturo ĝenerale. En la nuna momento tio estas la esenca tasko sur la kampo de nia informado.

I. L.

TASKOJ DE LA MONATO

1. Por ĉiu unuopulo: Aĉeti almenaŭ unu Esperantan libron; sendi leteron aŭ poŝtkarton, eventuale kun kritikaj rimarkoj aŭ deziresprimoj, al ĉiu radio-stacio, kiu elsendas en Esperanto; ne forgesi tuj pagi la jarajn kotizojn al U.E.A. (individa membro), landa asocio kaj loka grupo.

2. Por la lokaj grupoj: Komenci membrigadi al la grupo, landa asocio kaj U.E.A. tiujn komencantojn en la novaj kursoj, kiuj jam kontentige progresis; fondi aŭ larĝigi la bibliotekon de la grupo per aĉeto de Esperantaj libroj kaj abono de kelkaj revuoj kaj gazetoj; pridiskuti en unu el la semajnaj kunvenoj tiun parton de la Festparolado en Harrogate, kiu rilatas unuavice al la lokaj grupoj (septembra numero de "Esperanto", p. 146).

3. Por la landaj asocioj: Dediĉi unu tutan kunsidon de la gvida instanco (Komitato aŭ Estraro) al la problemo de kiel eble plej bona informado pri Esperanto en 1962: fondo aŭ plifortigo de Informa Fakoj; trastudo de la Principaro de Frostavallen kaj apliko de tiuj principoj por informado en la koncerna lando; agado precipe en universitataj medioj kaj en internaciaj kongresoj okazantaj en la koncerna lando; utiligo de la du flugfolioj de U.E.A. kaj aliaj materialoj.

4. Por la fakaj organizaĵoj kaj iliaj membroj: Publikigi artikolon aŭ informojn en bona nacilingva faka periodaĵo pri la signifo de Esperanto

por la koncerna fakoj kaj pri la ĝisnunaj ĉefaj atingoj de Esperanto en tiu fakoj: fakaj terminaroj, libroj, revuoj, Esperantlingvaj resumoj al nacilingvaj studoj, Esperantista faka organizaĵo ktp.

RICEVITAJ LIBROJ

Nguyen Xuan Tram: SURTERA INFERO. Trad. Nguyen Minh Kinh kaj Nguyen Minh Tung. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, Vjetnamio, 1961. 115 p. 19 × 13 cm. Prezo ne montrita.

PRAHA GVIDLIBRO. Esperantigis J. M. Havlík. Eld. Eldonejo por Sporto kaj Turismo, Praha, 1961. 186 p. 17 × 12 cm. Prezo Kčs. 16.

Seiho Nishi: NIA KORPO. Anatomio kaj fiziologio de la homo por laikoj. Eld. Gunma Esperanto-Societo, Maebaŝi, Japanujo, 1961. 106 p. 21 × 15 cm. Prezo 1.20 us. dol.

Seiichi Kato: LERNOLIBRO DE OFTALMOLOGIO. Eld. Aoŝima, Tiba, Japanujo, 1961. 88 p. 26 × 18 cm. Prezo 1.40 us. dol.

Sooseki Nacume: LA TURO DE LONDONO. Trad. Seiho Nishi. Eld. 47a Kongreso de Japanaj Esperantistoj, 1960. 56 p. 18 × 12.5 cm. Prezo: 0.27 us. dol.

APRENDA ESPERANTO SIN MAESTRO! Eld. Editorial Cosmopolita (Coleccion Cosmopolita n-ro 520), 1961. 80 p. 11.2 × 7.6 cm. Prezo 15 argentinaj pesoj.

GRAMATICA DEL ESPERANTO. Eld. Editorial Cosmopolita (Coleccion Cosmopolita n-ro 521), 1961. 80 p. 11.2 × 7.6 cm. Prezo 15 argentinaj pesoj.

PRIMER MANUAL DE LA LENGUA AUXILIAR ESPERANTO. Eld. Esperanto, Caracas, Venezuelo, 1960. 28 p. 16 × 12 cm. Prezo ne montrita.

Kolektanto de Ĉielarkoj

Tibor Sekelj

La atmosfero en la triaklasa kupeo estis sufoka. Ŝvitodoro ŝvebis en la aero. Kun malŝato mi pensis pri la multaj horoj de vojaĝo kiuj ankoraŭ staris antaŭ mi.

Miaj kunvojaĝantoj vigle babilis pri temoj, kiuj eĉ ne por momento povis fiksi mian atenton.

Vidalvide de mi, ĉe la kontraŭa flanko de la fenestro, sidis dekjara nigrokula knabino. Sur ŝia vizaĝo ŝajnis al mi diveni la saman enuon, kiun mi mem sentis.

Mi decidis alparoli ŝin.

Responde al miaj demandoj Sita rakontis, ke ŝi lernis en la kvara klaso de elementa lernejo. Ŝi ŝatis la geografion kaj malŝatis la matematikon. Post kelkaj pluaj demandoj la konversacia materialo estis elĉerpita. Paŭzo ekestis.

Mi ekmemoris pri kelkaj leteroj kun diverslandaj poŝtmarkoj, kiujn mi havis en la poŝo, kaj pensis, ke per ili mi povus ĝojigi la knabinon.

"Ĉu vi kolektas ion, Sita?"

"Kolekti?... Ne, nenion mi kolektas", ŝi respondis.

Silento. Mi ekserĉis alian temon por vivteni la konversacion.

"Kaj ĉu vi kolektas ion, sinjoro? Kion vi kolektas?"

La fronta atako de Sita frapis min neatendite.

Mi ja estis veterana kolektanto de ĉio imagebla. Por ne kompliki la aferon, mi volis diri ion simplan, kiel poŝtmarkoj aŭ bildkartoj. Tamen post momento tio ŝajnis al mi neinda banalaĵo. Dum tempero mi pretis konfesi al ŝi la sekreton de mia vivo: mi kolektas aventurojn! Sed tio ŝajnis tro abstrakta. Ŝi certe ne kapablus kompreni min.

Dum kelkaj sekundoj mi rigardis tra la fenestro meditante. Ĉar ni sidis en la unua vagono de la trajno, mi klare povis vidi tra la fenestro la vapor-tufon elŝprucatan el sub la lokomotivo. La sun-radioj rompiĝadis tra la vaporo kaj formis duonrondan zonon de ĉielarko ĉirkaŭ ĝi.

"Ĉielarko!" mi ekkriis kun admiro.

"Kion?... Ĉu ĉielarkojn vi kolektas?" demandis mia inkvizitoro kun la okuloj larĝe malfermitaj.

"Kion?... Jes, kompreneble, hm, ĉielarkojn. Ĉu io stranga pri tio?"

Sita ne sciis ĉu kredi al mi aŭ ne. Subokule ŝi ekzamenadis mian vizaĝon por malkovri sur ĝi ŝercan rideton. Sed ŝerca rideto tie malestis.

"Kaj kiel vi kolektas ilin?" ŝi kuraĝis finfine demandi.

La radoj de la vagono per monotona frapado akcentadis la sufokan atmosferon de la kupeo. La ĉielarko ĉirkaŭ la vaportufo vetkuradis kun la lokomotivo antaŭ miaj okuloj.

"Kiel mi kolektas ilin? Simple. Kie ajn mi vidas unu, mi enmetas ĝin en mian kolekton... Kompreneble, nur se mi ne havas ankoraŭ similan ekzempleron".

La nigraj okuloj de Sita fikse rigardis min. Ili atendis. Ili atendis iun gravan malkovron.

"Ĉar ĉielarkoj povas esti, vi ja scias, tre diversspecaj....

"La unua kiu eniris mian kolekton, estis tre kutima ĉielarko. Mi vidis ĝin, kiam mi estis apenaŭ kvinjara. Mi subite ĉesis la ludadon kun mia pli aĝa frato kaj aliaj vilaĝaj knaboj. Senspire mi gapis al la bunta miraklo. Ĝi ŝajnis tiel proksima!

"Mia frato, vidinte mian admiron, diris: 'Tiu, kiu sukcesas pasi sub la ĉielarko, ĉiam en la vivo

sukcesos plenumi sian deziron!" Li ŝajnis paroli serioze. Mi eĉ momenton ne dubis pri la vereco de lia aserto.

"Senvorte, kvazaŭ hipnotita, mi ekmarŝis en la direkto de la mirinda pordego. Mi rapidis tra la vilaĝa strato ne deprenante la rigardon de la ĉielo, kaj alveninte al la rando de la vilaĝo mi daŭrigis la marŝadon tra la vasta paŝtejo. Ŝajnis al mi, ke mi rapide alproksimiĝas al la arko de ĉiuj sukcesoj".

"Kaj ĉu vi sukcesis? Ĉu vi pasis sub ĝi?" senpacienca Sita.

"Ne. La suno malleviĝadis pli kaj pli, kaj la ĉielarko paliĝis ĝis fina malapero. Nur mi restis sola kun mia senlima admiro, gapanta al la ĉielo.

"La vidaĵo de tiu ĉielarko restis tiel profunde gravurita en mia menso, ke mi senhezite povas diri ke ĝi restis mia propraĵo. Tiu estis mia unua sperto pri la posedo de ĉielarko. Posedo, cetere, kiun neniuj povas de mi forpreni, okazu kio okazos.

"Poste sekvis aliaj. Unu post la alia ili fariĝis miaj, kreante mian kolekton".

Sita sidis senmova aŭskultante min. Ŝia patro proponis al ŝi oranĝon, sed ŝi malakceptis. Ŝi estis tro okupita per la rakonto.

"Kaj ĉu vi havas multajn ĉielarkojn, sinjoro? Kiaj ili estas?"

"Hm, jes. Ne estas multaj en mia kolekto, ĉar... mi ja ne prenas iun ajn ĉielarkon. La kutimajn mi lasas por aliaj, kaj prenas nur la eksterordinarajn. Ekzemple...."

Dum momento mi intense serĉadis en la arĥivo de mia memoro iun elstaran ekzempleron el mia kolekto. Fine jen ĝi estis.

"Mi troviĝis en antikva marborda urbeto de mia lando. Post pluva mateno subite disiĝis la nuboj kaj, eĉ antaŭ ol mi ekvidis la sunon, ĉielarkoj aperis sur la ĉielo. Mi diris 'ĉielarkoj', ĉar ne estis unu, sed du. Unu super la alia. La pli malgranda estis klara, kun koloroj tre intensaj. Unu el ĝiaj flankoj ripozis sur la antikvaj tegmentoj de la domaro, dum la alia dronis en la maron. Ĝi aspektis kvazaŭ simbolo esprimanta la ligan inter la urbo kaj la maro. Kaj la ĉielarko pravis. Dum multaj jarcentoj la loĝantoj de la urbo estis navigistoj, fiŝkaptistoj, piratoj, markomercistoj kaj maristoj sur ĉiuspecaj ŝipoj.

"Super tiu ĉi bildo, kvazaŭ formante kadron al ĝi, etendiĝis la dua ĉielarko. Iomete pli pala ol la suba.

"Kaj nun, Sita, se vi promesas ne rakonti ĝin al aliaj, mi diros al vi sekreton".

"Mi promesas", flustris la knabino.

Mi ĉirkaŭrigardis por certiĝi ke neniuj aŭskultas nin. Tiam mi alproksimiĝis al la knabino.

"Imagu", mi diris, "la koloroj de la supra ĉielarko estis renversitaj. Ĉiu bona kolektisto scias, ke la violkoloro kaj la blua estas la supraj koloroj, kaj la ruĝa kaj indigo troviĝas malsupre. Kaj tiel ili troviĝis en la malsupra ĉielarko. Sed en la supra

la ordo estis renversita, kvazaŭ ĝi nur respegulus la alian".

Sita rigardis min konsternite. Sur ŝia vizaĝo estis videble ke ŝi estis konscia pri la graveco de la sekreto.

"Kaj poste...?"

"Poste... Mi fotografis per kolora filmo la duoblan ĉielarkon, kaj se iu ne kredas, mi montras la foton. Aŭ mi diras 'demandu Nina. Ŝi estis tie kaj ŝi povas konfirmi mian aserton'.

"Sed mi prezentos al vi alian ekzempleron de mia kolekto", mi reprenis la rakonton, jam kuraĝigita per la granda intereso, kiun la brunhaŭta amikino montris por mia kolekto.

"Okazis tio en alta montaro. Kune kun kelkaj amikoj mi troviĝis en tendaro, en valetoj inter neĝaj pintoj. Pro la alteco ni ĉiuj sentis iom da sufokiĝo, kiu ne permesis al ni dormi.

"Post longa sendorma horo mi decidis eliri el la tendo. Ekstere mi trovis mian amikon Georgon, sidantan sur ŝtono. Fumante li observis la naturon.

"Estis plendluna nokto. La luno kvazaŭ grandega lanterno pendis super la proksima glaciejo, banante la rokecan pejzaĝon per blua mistera lumo. La ĉielo surhavis milojn da steloj. Ĉiuj brilegis tiel grandaj, kiajn mi ankoraŭ neniam vidis ilin. La altaĵa aero estis pura pro la maldenseco kaj sekeco. La videblo estis senfina.

"Subite du flamoj aperis sur ambaŭ flankoj de la luno, apogante sin sur montojn ĉirkaŭ la glaciejo. 'Kia stranga afero!', diris Georgo, homo kun longa sperto montgrimpa.

"Antaŭ niaj surprizitaj okuloj la du flamoj komencis leviĝadi transformiĝante en du kolonojn. Nun ili kurbiĝadis. Iom post iom ili formis arkon ĉirkaŭ la luno. Kaj fine la arko koloriĝis je ĉiuj koloroj de la ĉielarko.

"La spektaklo estis eksterordinare bela. Ni staris tie kun la spiro retenita, kaj ĝuis intense.

"Poste mi eksciis ke nur malmultaj homoj en la mondo ekzistas kiuj vidis similan fenomenon. Kaj kompreneble, mi estas tre fiera havi en mia kolekto tian maloftaĵon".

Eta Sita senspire min aŭskultis. Ŝi glutis ĉiun mian vorton.

"Rakontu ankoraŭ, sinjoro", ŝi diris kun peta voĉo, kiam mi ekpaŭzis. Kaj mi daŭrigis.

"Sed en mia kolekto troviĝas ne nur maloftaĵoj, sed eĉ veraj altvaloraj ekzempleroj. Mi prezentos al vi la plej altvaloran el ĉiuj miaj ĉielarkoj. La plej multekostan, por tiel diri.

"En iu malproksima lando mi vizitis foje la iaman imperiestran palacon, kiu nun estas transformita en muzeon. Ĉiuj salonoj estis malfermitaj. Nur unu ĉambreton, en kiu la krono de la imperiestro estis gardata, oni malfermis nur je speciala peto de la vizitantoj. Post la necesaj formalajoj la gardisto malŝlosis la pordon, kaj ni eniris. Nun ni staris en malgranda ĉambro, malplena kaj

sen ornamaĵoj. 'Kio okazos?' ni demandis nin. Sed la respondo jam venis.

"El la planko, meze de la ĉambro, ekleviĝis kvarangula kolono. Kiam ĝi leviĝis ĝis la alteco de niaj brustoj, subite la metalaj vandoj de la kofro sur la supro de la kolono malfermiĝis lasante libera vitran skatolon. Kaj en ĝi la kronon.

"Jes, vere, tie estis antaŭ niaj okuloj la ora kronego de la imperiestro, plena de brilaj juveloj. La plej belaj rubenoj kaj safiroj viciĝis tie unu apud la alia. Kaj pluraj perloj je grandeco neniam vidita.

"Kia bankedo por la okuloj!

"Sed la plej valora juvelo troviĝis sur la frunto de la krono. Ĝi estis brilanto granda kiel juglando. Neniam mi sonĝis eĉ pri io simila. Jam mi ne memoras ĉu ĝia nomo estas Kohinor aŭ Orlov, aŭ io alia, sed mi estas certa, ke ĝi estas unu el la plej grandaj brilantoj ekzistantaj en la mondo.

"Subite okazis io neatendita. Tra trueto sur la kolora kurteno kiu kovris la fenestron sunradio eniris, kaj tuŝis la kronon. Ĝi tuŝis precize la gigantan diamanton. Sammomente centoj da delikataj strioj de ĉielarkoj kovris la murojn kaj la plafonon de la ĉambreto. Subite ni jam ne troviĝis en senornama griza ĉambreto. Ni staris meze de luksa salono kun cento da ĉielarketoj kiuj multobligis la dimensiojn de la ejo, kaj kreis la ĝustan etoson por la observado de la imperiestra krono.

"Jen, Sita, tiu ĉi estas la plej altvalora el ĉiuj miaj ĉielarkoj. Kaj mi devas al vi konfesi, ke por mi ĝi valoras pli ol se mi posedus la brilanton mem. Ĉar havante la juvelon, mi ĉiam timus ke iu ĝin forŝtelos de mi. Kaj krome, eble neniam mi sukcesus plu per ĝi krei tiel riĉan aron da ĉielarkoj".

"Vere sinjoro, mi kredas ke vi estas tre riĉa! Mi envias vin".

"Ho, ne, ne diru tion", mi rifuzis la flaton kun modesta rideto. Eble iam ankaŭ vi povos fari vian propran kolekton, kaj fariĝi eĉ pli riĉa ol mi.

"Sed ne kredu", mi daŭrigis post ioma paŭzo, "ke ĉiuj ĉielarkoj el mia kolekto estas altvaloraj. Estas en ĝi ankaŭ kelkaj kiujn mi kolektis nur pro strangeco. Estas inter ili, ekzemple, unu komika ĉielarko".

"Komika? Kiel povas esti ĉielarko komika? Rakontu sinjoro".

"Jen kiel okazis. Mi dormis en la sama ĉambro kun miaj gepatroj. Estis somermeza frumateno. Tra fendo apud la kurteno penetris iom da sunradioj, kiuj inundis la ĉambron per milda oranĝkolora duonlumo. Mi estis kuŝanta surdorse. Subite mi rimarkis sur la plafono kolorajn striojn. Post ioma observado mi konstatis, ke temis pri vera ĉielarko, en kiun endesegniĝis vico da montetoj, barante tiel partojn de kelkaj koloroj.

"Mi fariĝis scivolema. Mi ĉirkaŭrigardis serĉante la fonton de la stranga ĉielarko, sed ne

sukcesis malkovri ĝin. Mi klopodis fari logikajn deduktojn pri la direkto de la radioj. La serĉado de meblo kun dentumita rando restis senutila. Longe mi kuŝis sendorma, cerbumante.

"En certa momento mia patrino vekiĝis. Kaj tio ĉion ŝanĝis.

"Per sia unua movo ŝi elstreĉis la brakon al la nokta tableto, kaj el la glaso kun akvo ŝi elprenis sian falsan dentaron. Dum tiu operacio la ĉielarko malaperis de la plafono. Tuj poste ĝi reaperis vigle ondumanta, sed.... sen la serio de montetoj. Jen estis la solvo de mia enigmo: komika ĉielarko kreita en glaso da akvo kaj borderita per falsdentaro!"

Mia kunvojaĝantino ekridis jam antaŭ la fino de la rakonto. Ŝi divenis la finon kaj ĝi amuzis ŝin. Nun ni kune ridis.

"Sinjoro", ekparolis la knabino post momento. "Mi ŝatus kolekti ĉielarkojn".

"Ĉu vere?"

"Ho jes, mi tiel ŝatus.... Sed kiel komenci? Al vi estis facile komenci, vi ja havis fraton!"

"Kiel komenci? Jes, tio estas problemo", mi diris penseme. "Tamen, mi havas ideon, Sita. Ekrigardu tra la fenestro".

Ni klinis nin trans la fenestro, kaj mi indikis per la fingro al la ĉielarko, kiu fidele akompanadis ankoraŭ la vaportufon sub la lokomotivo. Kiam Sita rimarkis ĝin, ŝi ekkriis pro ekscitiĝo.

"Ĉu ĝi plaĉas al vi, Sita?.... Ĉu vi ne kredas, ke ĝi taŭgus por komenci vian kolekton per ĝi?"

"Belega ĝi estas. Mi volus per ĝi komenci, sed kiel?"

"Jen kiel. Ni ŝanĝu la sidlokojn, tiel ke nur vi povu vidi ĝin. Mi promesas ne plu elrigardi tra la fenestro, kaj ĉar la suno jam baldaŭ subiros, vi estos la lasta kiu ĝin vidos. Ĝi restos nur via. La unua en via kolekto".

"Vi estas vere bonkora, sinjoro. Sed tiu ĉi belega ĉielarko tiam mankos el via kolekto".

Malpeze mi svingis la manon antaŭ mia vizaĝo:

"Ho ne zorgu, amikino, mi ne bezonas ĝin. Mi jam havas similan en mia kolekto".

Dum duonhoro Sita fikse rigardadis tra la fenestro. Sur ŝia vizaĝo intensa koncentriĝo estis videbla. Jes, la proceso de la ekposedo de la unua ĉielarko ĉiam estas akompanata de psiĥaj konvulsioj. Eĉ de fizikaj doloroj kelkfoje.

Subite la patro de Sita ektiris ŝin je la brako. Ni estis atingintaj la stacion kie ili devis forlasi la trajnon. Ni adiaŭis. Mia eta amikino brilis pro feliĉo.

Kaj ekde tiam mi ĉiam dum la vojaĝoj rigardadas tra la fenestro de la vagonaro. Mi tre dezirus denove vidi tian ĉielarkon, por meti ĝin en mian kolekton.

Ĉar, vi ja povis supozi, ke tian ĉielarkon, mi ne havis ankoraŭ en mia kolekto. Mi mensogis al Sita nur por ke ŝi akceptu la donacon sen konscienciproĉo.

ESPERANTO KIEL LITERATURA LINGVO

Estos utile, en la fino de tiu ĉi mallonga studo, ĵeti rigardon al kelkaj el la apartecoj de Esperanto, kiuj karakterizas ĝin kiel literaturan lingvon, kaj aparte taŭgigas ĝin por literatura uzado. La ĉefa karakterizo de Esperanto estas ĝia granda fleksebleco, kiu ŝuldiĝas ĉefe al la fakto, ke — parte pro ĝia noveco, parte pro la tutmondeco de ĝiaj uzantoj — ĝi ankoraŭ ne atingis etapon de kliŝeco. Historie ĉiu moderna lingvo trapasis epokon de literatura ekspansio kaj eksperimento, kiam la normojn oni ankoraŭ serĉis, kaj regis preskaŭ senfina libereco de gramatiko kaj sintakso. Bedaŭrinde, hodiaŭ ĉiu etnika lingvo ĝis pli aŭ malpli granda grado rigidiĝis, kaj tiu, kiu aŭdacas uzi formojn kaj esprimojn aliajn ol la ĝenerale rekonatajn kaj akceptitajn, estas rigardata kiel danĝera aŭ kaprica eksperimentanto (se li estas evidenta klerulo), aŭ kiel simpla malklerulo (se li ne sukcesis sentigi sian klerecon). Feliĉe, lingvaj kliŝoj en Esperanto — kvankam tiaj ekzistas — ankoraŭ ne havas solidan aŭtoritaton, kaj la verkisto povas uzi eksperimentajn formojn, kondiĉe ke ili estas kompreneblaj kaj konformaj al la semantiko de la radikoj kaj "la spirito de la lingvo" (1). Kompreneble, iuj malmultaj esperantistoj volas jam nun kliŝigi la lingvon, kaj ne hezitas nomi "eraraj" formojn, al kiuj ili ne kutimiĝis per la propra lingvo-uzado aŭ legado (aŭ kiuj ne aperis en la lernolibro de ili uzita). Ekzemple :

"....ĝi (la antaŭtuko) nur hazarde povis gardi la nigran robon." La antaŭtuko ne "gardas" sed "ŝirmas" ion, evitigas materian difekton. La remparo ŝirmas la soldatojn de la kugloj. La ombrelo ŝirmas kontraŭ la suno aŭ pluvo. Gardi = zorgi por eviti minacantan danĝeron. Oni gardas reĝon, la interesojn de iu, ktp. (2)

Havi, kiel nia aŭtoro, atenton pri la semantika pureco de la radikoj, estas laŭdinde. Tamen en la Plena Vortaro, sub "gardi", ni trovas ankaŭ jenajn du ekzemplojn: "remparo gardas la urbon" kaj "tuko gardis la nukon kontraŭ la suno", kiuj plene pravigas la t.n. "eraran" uzon. La entuziasma Wranka volas tro rigore difini la permeseblajn limojn de libera elektado inter la vortprovizo (— kio, parenteze, multe malsimpligus la lingvon por lernantoj kaj uzantoj, kaj grade tiel malfaciligus ĝian lernadon, kiel estas malfacila la lernado de etnika lingvo).

La fleksebleco de Esperanto devenas kompreneble de ĝiaj karakterizoj, el kiuj kelkaj ĉefaj estas :

(a) *La akuzativo kaj la akordiĝo inter substantivoj kaj adjektivoj.* Per sia akuzativa formo, Esperanto ricevas grandan kaj utilan liberecon de vortordo, kiu multe kontribuas al ĝia elegantecon, subtileco kaj klareco. Oni devas klare kompreni, ke ĉiu lingvo havas akuzativon en tiu aŭ alia formo: iuj lingvoj, kiel Esperanto, ŝanĝas la formon de la substantivo; aliaj, kiel la angla, montras la akuzativon per la pozicio de la substantivo en la frazo. Ambaŭ metodoj povas kaŭzi malfacilaĵojn al la lernanto, se ties denaska lingvo uzas alian metodon (aŭ malsimilan vortordon); sed kiam oni plene posedas la koncernan lingvon, estas nedubinde, ke la formŝanĝo liveras pli da elasteco (= fleksebleco) ol la pozicia akuzativo (3). Simile, elegantecon, subtilecon, klarecon kaj flekseblecon donas al Esperanto la akordiĝo inter substantivoj kaj adjektivoj, parte pro tio, ke la vortordo estas tiel liberigita.

(b) *Ebleco formi adjektivojn kaj adverbojn el substantivoj kaj verboj, substantivojn el adjektivoj kaj verboj, verbojn el adjektivoj kaj substantivoj, ĉiujn vortkategoriojn el sufiksoj, ktp.* Tiu ĉi rezulto de la aglutina naturo de Esperanto konkrete ĝas dumaniere. Unue, se ni konas, ni diru, substantivon, ni tuj scias formi la aliajn kategoriojn, ekz-e el *frukto* tuj formiĝas *frukta*, *frukte*, *frukti*, k.s. Tio estas grava avantaĝo kompare kun la etnikaj lingvoj, en kiuj la adjektivo respondanta al iu substantivo tre ofte devenas de tute malsimila pravorto, havas formon tute neligitan al la substantivo, aŭ eĉ foje tute ne ekzistas. Se ekzemple ni formas la koncepton *ŝtata juro*, ni tuj scias en okazo de bezono, ke la adjektiva formo de tiu frazo estas *ŝtate jura*, kaj la signifo de tiu esprimo restas same klara por ĉiuj legantoj. Sed en iuj lingvoj, kvankam la substantiva formo estas klara, ni vane serĉas adjektivan ekvivalenton. Aŭ denove: en Esperanto, el la infanluda *skutilo* ni senĝene formas la klaran verbon *skuti*; la angla lingvo havas

(3) Eĉ kiam la fama angla poeto Milton, utiligante unu el la malmultaj eblecoj liverataj de la angla lingvo — la pronoman akuzativon, ŝanĝas la normalan vortordon, ekz-e: **Him who disobeys me disobeys** ("Lin kiu malobeas, min malobeas"), la rezulto ne nur efikas fremdece, sed ankaŭ malklare, miskomprenige kaj sencokonfuze. Tiel forta estas la vortorda tradicio en la angla. Por plena studo pri la akuzativo, vd. G. Waringhien: "La akuzativo en Esperanto, el teoria kaj interlingvistika vidpunkto" (Esperantologio, Vol. I, p. 33-52).

(1) Tion faris lastatempe — laŭ iuj, hovee — Ivo Rotkviĉ en la traduko "Tragedio en la universo".

(2) D. Wranka: "Lingvokritika recenzo XIII" (Rio Esperantista n-ro 78/79, sept/okt. 1961).

ekvivalenton de *skutilo*, sed tute ne scias esprimi tion, kion oni faras per ĝi! Due, la ebleco utiligi ĉiujn radikojn en ĉiuj kategorioj — kun la senco kiel sola kriterio — kondukas al trafaj, viglaj kaj pitoreskaj esprimoj, kiuj tute ne dependas de eventualaj nacilingvaj ekvivalentoj, ekz-e:

*"Ankoraŭ devas fajri vera tago,
ankoraŭ devas nigri vera nokto"*

(Kurzens).

Tie la substantiva radiko *fajr-* kaj la adjektiva radiko *nigr-* verbiĝis kun plena signifo kaj trafa rekteco.

(c) *Subtileco de la afiksoj*. Tio ĉi estas efektive korolaro de la venonta paragrafo (d), sed meritas almenaŭ kelkajn apartajn liniojn. Ne nur, kiel mi aludis supre, la afiksoj povas esti uzataj kiel senchavaj radikoj: *ada*, *eta*, *eble*, *misi*, k.s., sed ili ebligas ankaŭ grandan nuancecon de esprimo en kunmetaĵoj. Mi havas spacon nur por doni du-tri ekzemplojn. Eli Urbanová, ĉu ne, titolis sian poemaron "Nur tri kolorojn", kaj tiuj tri "koloroj" estis — *nigreta*, *nigra*, *nigrega*! Denove, se ni ekscias, ke iu vagas sola, nia reago povas esti tute malsama, depende ĉu li vagas "solece" aŭ "soleme". Kaj tute aparte subtila estas nia amiko "-um". Logikuloj bonvolu klarigi, kiel tiu ĉi sufikso "sen propra signifo" fariĝis tiel vive vigla kaj tiel esprimiva! Gejunula paro restas iom da tempo ekstere sub la nova luno; ili revenas en la domon; oni demandas: "Kion vi faris?"; ili respondas: "Ho, *ni arbarumis*!". Oni scias sufiĉe precize, kiel ili pasigis sian tempon... Sed Zamenhof havu la lastan vorton: en la Ekzercaro (4) li donas 52 senchavajn vortojn derivitajn per afiksoj el la radiko *san-*: *sano*.... *saniga*, *saneco*, *sanigi*, *saniĝi*... *malsaneta*, *malsanema*, *malsanulejo*... ktp. Sed tio jam kondukas nin ĝis la sojlo de nova paragrafo.

(d) *Riĉeco de semantika enhavo*. La klare preciza signifo de la esperantaj vortelementoj sukcesigas la, por tiel diri, akrobataĵojn menciitajn supre sub (b) kaj (c). La relativan malmultnombrecon de la radikaro kompensas la vortkonstruaj eblecoj, kiuj siavice dependas de la semantika dinamismo de la elementoj. Per la relative malmultaj radikoj oni atingas grandan esprimkapablon. La 4a eldono de la Plena Vortaro listigas 7866 radikojn. Sed: "El tiu vortradika materialo oni povas formi en Esperanto minimume 80.000 vortojn, kiuj respondas al vortoj uzataj en la naciaj literaturaj lingvoj. Sed el tiu vortradika materialo oni povas fari ankoraŭ grandan nombron da aliaj derivitaj vortoj kaj vortkombinoj, kiuj perfekte trafas difinitajn ideojn, sed kiuj ne estas adekvate esprimeblaj en la naciaj literaturaj lingvoj" (5).

Cetere, estas menciinde, ke ĝuste tiu ĉi karakterizo de Esperanto klarigas almenaŭ parte ĝian relativan facilecon por la lernanto. Tio ĉi montri-

ĝas per komparo: por kompreni 84% de ordinara teksto en la angla lingvo, lernanto bezonas 1.400 vortojn; en Esperanto li bezonas 550 radikojn. La plena supereco tiurilate de Esperanto montriĝas per jena tabelo (6):

%	angla	Esp.
84	1.400	550
90	2.350	790
93	3.000	965
96.8	4.700	1.400
99	7.000	2.000
99.75	10.000	2.800

Alia grava karakterizo de Esperanto estas ĝia kapablo esprimi koncize la konceptojn. Tio devenas unuavice de la sistemo de vortkunmetado, kiu tre ofte ebligas esprimi per vortkunmeto koncepton, kiu bezonas en alia lingvo tutan frazon. Al tio kontribuas ankaŭ la vasta uzado de la adverbo en Esperanto. Ekzemple, en la verso:

kiu l'okulojn rozvuale vindas,

la adverbo *rozvuale* evidente anstataŭas la frazon "per vualo de rozoj" aŭ eĉ *kvazaŭ per vualo de rozoj*. Gregor (7) distingas ok kategoriojn de tiaj derivitaj adverboj: *kaŭzo* ("akvomanke ĝi mortis"); *tempo* ("geknabe ni vidis"); *grado* ("pretertere dikaj"); *celo* aŭ *rezulto* ("sange bati"); *instrumento* ("pafite mortigas"); *loko* ("ĝardene sidas"); *maniero* ("ridegis plormiene"); *komparo* ("gazele belus").

Laste, kiel karakterizon de la literatura Esperanto mi devas mencii ĝian *rimriĉecon*. Tiun ĉi karakterizon ne rimarkas ĉiuj esperantistoj, verŝajne pro miskompreno de la signifo de "rimriĉeco". La rimkapabloj varias de lingvo al lingvo; iuj lingvoj (ekz. la angla) estas relative malriĉaj je rimoj, aliaj (ekz. la ĉeĥa) estas rime tre riĉaj (8). Sed kune kun la rimebleco mem devas ekzisti ankaŭ *varieco* de la rimeblecoj; en la latina, ekzemple, estas treege facile trovi rimojn, ĉar abundas la samaj vortfinaĵoj, sed, ĉar rimado ĉiam per la samaj vortfinaĵoj baldaŭ fariĝas tede monotona, rimado ne ekzistis en la klasika latino, kaj la facila rimtintado de mezepokaj latinaj versoj multe bagateligas tiujn verkojn — speco de latina adasismo. La rimeblecoj nepre neniel dependas de la nombro de vortoj kiujn la lingvo posedas (9), sed

(6) vd. Setälä: "La genio de Zamenhof: efekta lingvo" (Memorlibro pri la Zamenhof-Jaro, p. 43).

(7) D. B. Gregor, M.A.: "La funkcio de la derivita adverbo en Esperanto" (Esperantologio, vol. II, n-ro 2, p. 100-108).

(8) vd. E. Osers kaj J. K. Montgomery: "Modern Czech Poetry" (1943), p. 11.

(9) "En la greka kaj latina lingvoj, kiuj estas altgrade fleksiaj kaj ŝargitaj per identaj finaĵoj indikantaj kazon, sekson, nombron, tempon kaj modon, rimado estas facila.... En la angla, rimoj estas relative maloftaj... Parte pro la hibrida origino de la angla kaj parte pro siaj multspecaj formoj, (la anglaj) vortoj, precipe la anglosaksaj, kiuj formas la kernon kaj grandparte la esencon de (la angla) poezia vortprovizo, posedas pli grandan variecon de finaĵoj ol la vortaroj de malpli miksitaj kaj pli unuformaj lingvoj. Efektive, ĝuste

(4) Fundamento de Esperanto, Parizo, 1931, p. 36.

(5) La internacia lingvo, red. D-ro Ivo Lapenna, Londono, 1954, p. 34.

Julio Baghy



estas tiu, kiu siatempe proponis, ke la 15a de decembro estu, ne nur la Zamenhof-tago, sed ankaŭ la Tago de la Originala Esperanto-Literaturo. En tiu tago, pli ol iam, la esperantistoj pensas pri sia literaturo kaj ĝia graveco, kaj aĉetas minimume unu esperantan libron. Ankaŭ en tiu tago multaj esperantistoj sendas libron donace al siaj korespondantoj, kaj tiel antaŭenigas samtempe la esperantan aferon kaj la konceptojn de internacia amikeco tiel karajn al la genia iniciatinto de la lingvo Esperanto.

de tute aliaj faktoroj. Ili estas : (i) la proporcio da vortoj, per kiuj NE eblas rimi; kaj (ii) la varieco de rimsonoj, kiun la naturo de la lingvo liveras. En Esperanto ni trovas, ke la proporcio (i) estas sensignifa, kaj la varieco (ii) estas granda; rezulte, la lingvo estas fakte rimriĉa. Por pruvi tiun aserton, ni ekzamenas la rimkategorion A en la "Esperanta Rimaro" de G. Waringhien (10), (ĉiam memorante, ke niaj rezultoj reprezentas nur proks.

pro tio, ke vortoj povas havi pli variajn finaĵojn en la angla, rimoj estas tiom pli raraj en tiu lingvo. Kontraŭe al rimoj en lingvoj altgrade fleksiaj, kies gramatikaj finaĵoj senĉese reokazas, kaj en lingvoj kiel la itala kaj la hispana, en kiuj la samaj vortkategorioj ofte ricevas la samajn sufiksojn, anglaj rimoj malofte okazas nur pro fleksioj kaj ordinare okazas ĉe vortoj apartenantaj al malsamaj kategorioj". (A.M. Clark, M.A., D. Phil. : Studies in literary modes, 1946, p. 180, 185-6). "La angla estas 'rimmalriĉa' ĉar ĝi estas rimarkinde riĉa je vokalsonoj". (Dorothy L. Sayers : "The divine comedy", Harmondsworth, 1949).

(10) Parnasa gvidlibro, Budapest, 1932.

kvinonon de la rimeblecoj).

En la A-kategorio ni trovas nur 5 radikojn, kiuj ordinare ne donas rimeblecon : *vafl-*, *dafn-*, *jaht-*, *majstr-*, *akv-*. Al ili ni aldonu ankaŭ la dubindan paron *faif-*, *tajp-*, kiu tamen foje povas formi akcepteblan rimparon, depende de la kunteksto. Do 7 radikoj, aŭ 0,36%, de la A-kategorio ne rimas. La rimeblecoj de la aliaj estas :

a 35; ab, ap 41; abl, apl, abr, avr 23; ac, as 75; aĉ, aĝ, aĉj 40; ad, at 236; adl, adr, atr 17; adz 2; af, av 66; aft 5; ag, ak 98; agl, akl, akr, agr 21; agm, agn, akm, akn 5; ah, aĥ, ak 66; aj 19; ajd, ajt 6; ajl, ajr 19; ajm, ajn 9; aĵ, aŝ 10; aks, aps 12; akt, arkt, apt 20; al, ar 287; alb, arb, arp, alp 18; alĉ, arĉ, arŝ 7; ard, art, ald, artr 78; alf, arf, arv, alv 9; alg, alk, arg 12; alm, arm, aln, arn 18; als, ars 6; am, an 237; amb, amp, ambl, ampl, ambr 18; amn 3; ampf 2; anc, ans 34; anĉ, anĝ 14; and, ant, ankt, andr 74; ankr, ang, ankt, ank, angl 37; anj 3; arc, ars 6; arg, ark 21; as, az 63; ask, ast, astm, astr 45; asm 10; asp, aspr 3; aŝt, ast 22; aŭ, aŭr, aŭl 38; aŭb, aŭp, aŭt, aŭd 20; aŭc, aŭs, aŭz 7; aŭg, aŭk 4; aŭm, aŭn 5; aŭstr 2; avr, abr, aŭr 17.

Sume, do, ni trovas en kategorio A variecon de 52 rimsonoj. Sed eĉ tie ne finiĝas la historio. Preskaŭ ĉiuj el la supraj rimsonoj povas alpreni iun ajn el 14 malsimilaj finaĵoj : o, oj, ojn, a, aj, ajn, e, en, i, u, as, is, os, us; kaj tio signifas, ke la rimeblecoj kaj la varieco de rimsonoj devas praktike esti multobligitaj 14-oble. La speciala rimsituacio de Esperanto, kio konsistas el radiko-plus-finaĵo multe plivastigas la rimeblecojn kaj rimvariecon de la lingvo. Por pruvi tion, se pruvo necesas, mi citas rimaĵon, en kiu ĉiuj radiksonoj samas, sed malsamas la finaĵoj. (Ni ne tro atentu la sencon de la rimaĵo; koncernas nin la sonoj.) Ni nepre trovas, ke la rimado efikas, ne samece, sed variece :

*Kiam la frosto sube knaras
kaj ŝiras vent' de februaro,
kaj ŝtale duras trotuaro
kaj arbosupre prujn' tiaras —
ho, tiam forno al ni karas :
ni kaŭras apud samovaro,
ignoras pekojn de l' najbaro,
nek planojn nek plenumojn faras.*

*Sed kiam printempkanton klaran
ni aŭdas tra la urb' fanfari,
kaj la parfumon deodaran
komencas ni surbrize flari,
ni sentas ardon temeraran,
kaj jukas ari, fari, pari !*

Kompreneble per la supraj konstatoj ni ne elĉerpis ĉiujn rimeblecojn de la lingvo, sed ni faris sufiĉon, verŝajne, por klare montri, ke Esperanto estas lingvo rimriĉa, kaj ke tiu estas unu el la karakterizoj, kiuj aparte distingas ĝin kiel literaturan lingvon.

William Auld

Novaj Libroj

Duope ricevitajn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

Drago Kralj: KVAR PRELEGOJ PRI ESPERANTA LITERATURO* Eld. Slovenia Esperanto Ligo, Ljubljana, 1960. 191 p. 17 × 12 cm. Prezo: 3.50 gld. (14 steloj).

Ljubljana bildoj vivece prezentigis al mia memoro, kiam atingis min la pale lazura libro de Drago Kralj. La kastelo de Ljubljana groteskis, maljuna gufo kun duonfermitaj okuloj, sur venta altaĵo. Printempo, printempo senbrida ĝin atakis ĉiuflanke. Vojetoj grimpis supren al ĝi: krutaj, verdumataj, sininterplektantaj: jen ŝtupo, jen stipo... Mia kunmarŝanto parolis, dum supreniro, pri gravaj, mondenaj temoj, iamaj teruroj de malamik-keco, nunaj burĝonoj de paco, mortoj, esperoj...

Trankvila ĝardeno ridetas per infanaj ĝojo-krioj. Lageto apuda krispiĝas sub venteto sunoplena. Sur benko, nia konversacio rekomenciĝis. Mia gvidanto parolis nun pri soleco montara, pri preskaŭ neimageblaj insuloj, pri flosado fea sur granda rivero...

Kaj tablo restoracia. La temaro plivastiĝis, sed mi konis mian gaston jam bone, kvazaŭ nia renkontiĝo ne estis nur kelkhora: malfermata animo al justo kaj belo, objektiva prijuĝo senpartia, delikata gusto, forta personeco. Venis, nun, impresoj pri profunda klero kaj serioza labormetodo, dum li parolis pri sia naskiĝanta verko: skizo pri historio de Esperanta literaturo.

Do, kiam la libro estis en miaj manoj, mi konfesas, ke la forta estimo, kiun la redaktoro de "Suda Stelo" estis vekinta en mi ricevis etan baton. Kio? Kvar prelegoj? Ĉu monto naskis muson?... Ne. Nur aldoniĝis, al la ceteraj kvalitoj, nova eco: modesto. Sub tiu malfiera titolo efektive kaŝas sin tute valora fasko da informoj: minejo, en kiu oni povas trovi preskaŭ ĉion, kion oni bezonas por dece esti informata pri la historio de nia literaturo, helpe de preciza kaj bone ordigita nom-indekso. Datoj, verko-titoloj, notetoj pri viv-okazoj estas elegante kunigitaj en preskaŭ prelega formo; kaj de ĉiu aŭtoro almenaŭ mezgrava, jen tutaj pecoj malavare kolektitaj (bedaŭrinde, nur pri versoj). Ĉi ĉio kaŝata inter senpretenda papero, sub senpretenda kovrilo, laŭ tiu senpretenda titolo! "Sed, kial "Kvar prelegoj" nur? Mi ja divenas vian laboron pioniran, ĉar, se por poetoj vi povis

ĉerpi el la Auld-a nesuperebla "biblio" — cititaj pecoj malsamas — por prozistoj vi devis labori explore tra neplugata lando..." Tion mi skribis al Kralj. Kaj li rebatis, ke efektive temis pri kvar prelegoj dum duagrada kurso. Li nur iom ampleksigis ilin.... "Sed, ĉu vi konscias pri la valoro de via laboro, pri la fakto, ke tia libro estis ege bezonata laborilo por ĉiuj seriozaj okupigantoj pri Esperanto literaturo? Kaj kial vi gardis tiom skrupulan objektivecon, ke ne nur viaj personaj opinioj tute malestas ĉar vi neniam juĝas, komparas, laŭdas aŭ mallaŭdas, sed ankaŭ estiĝas el tio certa manko en via verko, iom senpersoneca, malvarma, rigida, laŭ fiksitaj kaj de vi ne plu reviziitaj prijuĝoj?" Respondo: "Mi tro malmulton konas, mi ne ĉion legis el ĉiu aŭtoro, mi ne rajtas juĝi...? Nu, kara Kralj, daŭrigu vian laboron, pliigu la amplekson, presigu ĝin kiel "skizon pri literatur-historio de Esperanto"... Ne estu tro modesta.

Se vi sciis kiomfoje, por prelegoj tie kaj tie, mi jam ŝtelprenis el la de vi provizita materialo-stoko...

C.C.G.

POR NOVA AFERO NOVA MANIERO* Reepektita novelaro. Tradukis el la ĉina lingvo S. J. Zee, Censinio, Honfan kaj Venlo Fon. Eldonis Cina Esperanto-Ligo, P. O. Kesto 77, Pekino, Ĉinio, 1959. 206 p. 18 × 13 cm. Prezo: 6 steloj, 1,50 gld., 2 rb., 0,45 us. dol., £ 0.3.0.

La noveloj en ĉi tiu kolekto aperis unue en la paĝoj de la revuo "El Popola Ĉinio" kaj poste en aŭ "La Feliĉo" (1953) aŭ la unua eldono de "Por Nova Afero Nova Maniero" (1952). La eldonado estas verŝajne ŝtate subvenciita, sed tri eldonoj en malpli ol dek jaroj montras, ke la noveloj estas popularaj.

Lerte verkitaĵoj tuj post sukcesa revolucia milito en periodo de starigo de nova sociordo, ili alvokas al universalaj animsentoj. Kvankam malamo kontraŭ la "tigroj" de la malnova socio ne mankas en la rakontoj, ili celas reformi pli ol detrui tiujn, kiuj estas ankoraŭ sub la influo de la antaŭrevolucia socio. Ofte ili rakontas, kiel la juna generacio per sia kuraĝo, iniciatemo kaj laboremo edukas siajn gepatrojn kaj geavojn. La doloro kaj suferoj neeviteblaj en rapide evoluanta socio ne estas kaŝitaj, sed

bonhumoro kaj kapablo moki sin mem spicas la rakontojn. La stilo estas bonega. Sola makuleto, krom pluraj prezeraroj, estas dufoja misuzo de "sed" anstataŭ "tamen" kiel korelativo de "kvankam",

Edward Ockey

Eugeniusz Matkowski: POEMOJ* Eld. Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro, Brazilo, 1961. 100p. 18 × 14. Prezo: 3 gld. (12 steloj).

"Ne... poeto mi ne estas, mi poeton nur imitas.

Tiun nomon mi protestas, mi ĝin tute ne meritas." (p.63)

Jes, li pravas, laŭ kion de li oni kolektis en tiu ĉi libreto, li pravas, la pionira, naiva, blankanima Matkowski. Fakte, oni aperigis, de li, preskaŭ nur porokazajn rimojn: versajn leterojn. paroladetojn ĉetombajn (kiom multajn!), salutojn, toastyojn. Kaj tiom supraĵe oni traktis lin, ke en antaŭparolo oni eĉ misformis lian nomon kaj nomis lin Blatkowski. Tiu ĉi honesta versfaranto ne meritis tion. Mi havas ian senton, ke li ne estas nur tia, kia li prezentiĝas en tiuj ĝuste ritmantaj, sed longe trenataj versaĵoj. Meze de primitiv-romantismaj Gloraj Celoj, Verdaj Lunoj kaj — kompreneble — Steloj, Majstraj tombejoj, Sanktaj Verroj kaj Geniaj Verkoj, briletas la animo de Matkowski, kiu kredas, malgraŭ ĉio, al la kara spirita surŝarĝo de nia movado: la Interna Ideo, la Frateco Homara, kaj kiu suferas kaj ribeliĝas kiam la homoj neniel montriĝas taŭgaj por tio kaj respondas, al lia milda, manetenda alvoko, per "strat-filozofio" kiu detruas acide eĉ la purecon melankolian de Chopin-a muziko. Tie kaj tie, poezia fadeno kunligas la versojn: kaj li aperas poeto kiam li timas la stratodrakon pretan senkapigi proprajn diojn, la homamasojn amorfan: "sufiĉas nur, laŭ mia ŝajn'ke donu signon iu ajn"; aŭ kiam li dialogigas Teron kaj Lunon: ĉi tiu preta akcepti la teranojn, tiu admona kaj malĝoje anstaŭscia; aŭ kiam, inter multaj, troaj versoj, elstaras subita imago, bildo, sparko de poezio: "Ŝutiĝas folioj.... ŝtonpezaj minutoj/ ekfalas senbrue viv-maron bru-tromban". Kaj tiam oni povas bedaŭri, ke la versojn de Matkowski, ke lian ne elstaran, sed helan, honestan, lojalan personecon, prezentas tiom malbone aranĝita presado.

C.C.G.

Corrado Grazzini: CORSO DI ESPERANTO PER L'ALLIEVO E PER L'AUTODIDATTA* Eld. Paolet, S. Vito al Tagliamento, Italujo, 1960. 248p. Prezo: 3.60 gld. (14.40 steloj). APPENDICE. Prezo: 130 it. liroj.

Ĉu la plej bona recenzo ne estus la fakto, ke la trankvile honesta, konsciencie prizorgita gramatiko de Grazzini por italoj jam alvenis al sia kvina eldono? Kun sia etaj mankoj (iom da senekvilibro en la divido de la temoj: vidu ekz. la 9an kaj, kom-

pare, 10an lecionon) kaj grandaj virtoj (praktika uzebleco, kaj tiu originala ideo pri "Appendice"), ĝi estis taŭga instruilo en la manoj jam de centoj da kursgvidantoj kaj, mi opinias, de miloj da memlernantoj. Ne multe gravas, ke kelkaj ekzemploj povus esti pli bone elektitaj (ekz. tuj ĉe la komenco, italoj bezonas, pri valoro de ĉiu litero, specimenojn el la tipo ĉi-e-lo, mi-e-no, kiujn ili emus legi ĉielo, mjeno, ol el la tipo (so-i-fo), aŭ ke, kelkloke, certaj esprimoj estas neprecizaj (ekz. p. 21, mi tradukas: "La adjektivo alprenas adverban formon kiam ĝi ne estas atributo de nomo aŭ de pronomo", anst. "Anstataŭ adjektivon, oni uzas adverbon por esprimi predikaton kiam ktp"). La libro, kiun prof. Grazzini konstante plibonigas, estas bona, viveca, utila. Mi volas substreki la kompilon de la "Appendice" (= aldono) pri kiu mi supre parolis. Ĝi estas libreto aparta, en kiu la memlernanto trovos, ne nur la ĝustan tradukon de ĉiuj ekzercaĵoj el la gramatika volumo, sed, ĉe ĉiu



Tre taŭga donaceto por la tago de l'libro
Vidu recenzon en la junia n-ro
Havigu ĉe via librovendisto!

malfacilaĵo, klarigeton pri la eblaj eraroj kaj pri la kialo de la proponita ĝusta solvo. Imagu do kiom da amara pacienco gvidis prof-on Grazzini dum tiu laboro! La memlernanto preskaŭ sentas fizikan proksimecon de la instruisto. Kaj, se li povus imagi la rozhaŭtan, blankeg-haran kapon de nia

maljuna, kara amiko Grazzini ĉe la sia, se li povus koni la mildan, sed kelkmomente petolan freŝecon de lia rigardo, juna malgraŭ jaroj kaj malsanoj, ho, li estus altirata al Esperanto de iu plia ligilo, ne rezona, sed kora.

C.C.G.



47-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kopenhago, 4-11 Aŭgusto 1962

Sub la Alta Protektado de la Dana Cefministro Viggo Kampmann.

Konstanta adreso: ĉe Universala Esperanto-Asocio, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 2

Rotterdam, la 1-an de novembro 1961
Fervoja Rabato:

35% de la prezo de 2 unuvojaj biletoj estas la rabato, kiun la Dana Ŝtatfervojo donas al la kongresanoj aĉetantaj revenbileton. La rabato estas ricevebla ĉe ĉiu stacidomo kaj vojaĝagentejo je monro de la Kongresa Karto.

Infana Kongreseto:

En la kadro de la 47-a Universala Kongreso okazos la 7-a Infana Kongreseto, por geknaboj de 6 ĝis 13 jaroj.

La kotizo estas fiksita je 42,00 ned. gld. (80,00 d.kr.) por la tuta kongresa semajno. Du aŭ pli infanoj el la sama familio pagas po 37,00 ned. gld. (70,00 d.kr.). Petu aligilon kaj informojn ĉe la adreso de U.E.A.

Adoptaj Gepatroj:

Por ebligi la partoprenon al la Kongreseto de infanoj el nepagipovaj landoj aŭ de nepagipovaj familioj, ankaŭ ĉijare estas starigita la Fondaĵo "Adoptaj Gepatroj". La "adopto"

ne rilatas al aparta infano, sed al komuna kaso. La sumoj kolektitaj per la kotizoj de la "Adoptaj Gepatroj" estos uzataj ekskluzive por pagi la vetur- kaj restadkoston de la supre nomitaj infanoj. La kotizo por la Fondaĵo estas fiksita je 30,00 ned.gld., pageblaj ĉe la kontoj de U.E.A. aŭ ĉe la Kongresaj Perantoj.

Ĉiu esperantisto helpu al tiu ĉi kampanjo, subtenu la klopodojn fari la Infanan Kongreseton pli internacia kaj apogu laŭ tiu vojo la disvastigon de Esperanto ĉe la plej juna generacio.

Karavano:

Anoncas flugkaravanon la oficiala Peranto en Finnlando, s-ro Joel Vilkki, Somero.

Glumarkoj:

Ekde la 1-a de decembro estas aĉetblaj ĉe la Libro-Servo de U.E.A. kaj ĉe la Landaj Asocioj belaj koloraj glumarkoj pri la 47-a Universala Kongreso de Esperanto.

La glumarkoj estas nunjare vendataj je tre malalta prezo:

0,35 ned. gld. (1,40 steloj) por unu folio de 10 pecoj;

1,00 ned. gld. (4,— steloj) por 3 folioj.

Senpagaj Partoprenoj:

Esperanto-Societoj, kiuj premie disponigas senpagajn partoprenojn en la 47-a Universala Kongreso al gajnintoj de lokaj konkursoj, estas petataj anonci sin ĉe U.E.A. (Universalaj Kongresoj) en Rotterdam.

Statistiko (ĝis fino de oktobro):

Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 3, Belgujo 4, Brazilo 4, Britujo 23, Bulgarujo 4, Danlando 49, Finnlando 3, Francujo 19, Germanujo 16, Hispanujo 2, Hungarujo 1, Irlando 1, Italujo 8, Japanujo 3, Jugoslavio 6, Katario 1, Libano 1, Nederlando 8, Norvegujo 2, Nov-Zelando 1, Pollando 6, Portugalujo 1, Svedujo 8, Svisujo 1, Usono 1. Entute 178 el 27 landoj.

G. G. Pompilio

Konstanta Kongreso Sekretario

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la oktobran numeron.

Radio Roma. 1-XII, Granda itala pentristo Andrea Mantegna; 5-XII, Novaĵoj el Italujo; 8-XII, La Senpeka Koncipitino kaj la Anunciacio; 12-XII, Tra la literaturo; 15-XII, Artefariteco kaj naturo en la lingvoj; 19-XII, Leterkesto kaj bibliografio; 22-XII, Lokoj de S-ta Francisko: Greccio; 26-XII, Italaj kanzonoj en Esperanto; 29-XII, Italujo kaj fremdaj verkistoj: Madame de Staël. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.

Radio Zagreb. 7-XII, Radio-humuraĵo; 14-XII, Zamenhofa tago, tago de libroj; 21-XII, Vintraj feriotagoj; 28-XII, Respondoj al korespondantoj kaj novaĵoj el la movado. La elsendoj nun komencas kvin minutojn pli malfrue jaŭde je 22.05).

Radio Warszawa nun elsendas ĉiutage per ondoj: 249 m. (1205 kcs.), 48.43 m., 42.11 m., 41.99 m., 41.12 m., 31.50 m., 31.45 m., 31.01 m. Pola Radio organizas konstantan konkurso-enketon pri la kvalito kaj intereso de siaj programoj. Ĉiu aŭskultanto petu informilon pri tio de "Pola Radio, Varsovio, Polando". Multaj valoraj donacoj estos lotumataj inter la partoprenantoj.

CED

**Centro de Esploro
kaj Dokumentado**

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefono ARNold 90-81

ESPERANTO EN LA LERNEJOJ

En la februara numero de "Esperanto" aperis tabelo kun precizaj informoj pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en la jaro 1959/60. En la marta numero aperis kompletigo de la tabelo kaj montriĝis, ke en tiu lerneja jaro Esperanto estis instruata en minimume 340 lernejoj en 27 landoj kun entute minimume 13.009 gelernantoj. La tabelo tiel korektita kaj kompletigita servis kiel bazo por la diskutoj de la Lernejo Komisiono en Harrogate. Tiam evidentiĝis, ke pliaj lernejoj ne troviĝas en la tabelo: entute ĉ. 200. Tio signifas, ke la nombro de lernejoj altiĝis al proksimume 540 en 27 landoj kaj la nombro de gelernantoj al proksimume 15.000. CED konstante sekvas la fluktuadon, sed renkontas malfacilaĵojn pro la fakto, ke multaj ne raportas pri la enkonduko de la lingvo en iun lernejon aŭ pri la forigo de pli frue funkciaj klasoj. Tamen, kun tiu rezervo, oni povas konsideri la menciitajn ciferojn kiel proksimume gustajn.

Laŭ la informo ricevita de U.E.A. en Francujo nuntempe funkcias 70 kursoj de Esperanto en la lernejoj. Inter tiuj lernejoj troviĝas ankaŭ 19 porinstruistaj seminarioj kun entute pli ol 350 gelernantoj, kiuj baldaŭ estos profesiaj geinstruistoj. En Norvegujo komenciĝis instruado de Esperanto en la kvina klaso de gimnazio, anglalingva linio, en Sarpsborg. En septembro de tiu ĉi jaro komenciĝis la instruado de Esperanto en la tria klaso de gimnazio Aars & Voss en Oslo. En tiu lasta Esperanto estas instruata dum la unuaj 9 semajnoj de la lerneja jaro anstataŭ la franca, kaj post tio, nome dum la cetera parto de la instrua jaro, estos instruata la franca laŭ la programo. Ambaŭ kursoj estas aprobitaj de la Ministerio de Instruado. En Danlando, kiel jam anoncote, laŭ la nova instruprogramo Esperanto estas ekde tiu ĉi lerneja jaro libervola objekto en la oka kaj naŭa klasoj de la lernejoj, kiel ankaŭ en ĉiuj vesperaj lernejoj.

CED insiste petas la geinstruistojn de la Internacia Lingvo en la lernejoj kaj la komisiitojn aŭ landajn komisionojn en la lerneja kampanjo informi la kunlaboranton de CED pri la lernejaj aferoj s-ron D. Kennedy, 21, Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo pri ĉiuj klasoj de Esperanto en la lernejoj.

ESPERANTO-STRATOJ

En la rubriko de CED de la aprila numero de "Esperanto" estis publikigita listo de 132 stratoj aŭ placoj kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto en 17 landoj. Post tio venis informoj pri jenaj pliaj stratoj aŭ placoj:

Brazilo: 133. Rio de Janeiro (Strato Esperanto), 134. Rio de Janeiro (Strato Zamenhof), 135. Aracajú, 136. Salvador, 137. João Possoa, 138. Recife, 139. Ubá, 140. Curitiba, 141. Juiz de Fora, 142. Macaó, 143. Macaíba, 144. Niteroi, 145. Maceió, 146. Soledade, 147. Sorocaba, 148. Santo Amaro, 149. Feira de Santana, 150. Natal (Placo Zamenhof), 151. Natal (Placo Esperanto), 152. São João da Boa Vista, 153. Santa Maria, 154. Macaú, 155. Monte Santo de Minas, 156. Rosende. Krome, en Brazilo troviĝas 5 pliaj stratoj aŭ placoj en urboj publikigitaj sub "Brazilo" en la menciita listo. (Informoj laŭ statistiko kompilita de Brazila Esperanto-Ligo).

Francujo: 157. Le Havre (Informo komunikita de s-ro Bosc).

Ŝajnas, ke nun la listo estas sufiĉe kompleta. Eventualajn aldonojn bonvolu sendi al s-ro Renato Pennazio, Itala Esperanto-Federacio, Informoficejo, Casella Postale 248, Torino, Italujo.

ESPERANTO EN UNESKO-PUBLIKAĴOJ

Rezulte de la efika kunlaborado de UEA kun U.N.E.S.C.O., en diversaj publikaĵoj de tiu organizaĵo aperas de tempo al tempo informoj pri Esperanto. Tiaj informoj aperis interalie en *UNESCO Features, Bulletin on Bibliography, Documentation and Terminology, UNESCO Courier, Orient Occident* kaj en diversaj aliaj publikaĵoj kaj dokumentoj. Ĝis la nuna momento la kartoteko de CED enhavas 65 erojn, kiuj rilatas al pli gravaj informoj pri Esperanto en la U.N.E.S.C.O. publikaĵoj. Inter la plej lastdataj troviĝas informo pri Tagore en Esperanto, publikigita en *UNESCO Features* n-ro 377/61 kaj preskaŭ unupaĝa informo pri la kontribuo de U.E.A. al la Granda Projekto de U.N.E.S.C.O. pri la Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj en la revuo *Orient Occident*, n-ro 4/1961.

DEKJARA DATREVENO DE C.E.D.

CED ekfunkciis la 1-an de januaro 1952. Okaze de la dekjara datreveno ni publikigos en la januara numero de "Esperanto" koncizan raporton pri la plej gravaj rezultoj, kiujn atingis CED en 10 jaroj de sia agado. Samtempe aperos informo pri la ĉefaj laboroj plenumotaj en 1962 okaze de la 75-jara datreveno de la Internacia Lingvo.

DONACOJ POR CED

D-ro Maillard, Francujo	1-10- 0
D-ro Tortel, Francujo	-15- 0
F-ino Lemonnier, Francujo	- 7- 6

S-ino R. Seddon, Britujo	2- 0- 0
S-ro Foster, Britujo	1- 0- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danland	-10- 4
S-ro B. Reich, Usono	1-15- 8
S-ro Sven Sjöblom, Svedujo	1-17-10
S-ro S-ro W. Spaander, Nederlando	- 9- 5
S-ro Angerer, Aŭstrujo	-11- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	-10- 4
S-ro R. Docal, Usono	- 7- 0
Gesinjoroj Laurie, Britujo	1-10- 0
D-ro U. Stoppolini, Italujo	-14- 5
Itala Esperanto-Federacio	7- 3- 3
S-ro J. Futran, Usono	-14- 4
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	-10-10
S-ino E. Wolfskehl, Britujo	1- 0- 0
S-ro F. Parker, Britujo	-10- 0
S-ro A. Lomo, Usono	1- 7-11
S-ro H.V. Rasmussen, Danlando	-10- 4
S-ro F. P. Termaat, Nederlando	- 9-11
S-ro S. Sjöblom, Svedujo	2- 9- 8
Gesinjoroj Holmes, Britujo	10- 0- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	-10- 4
F-ino M. Boulton, Britujo	-10- 0
S-ro P. Nuez, Hispanujo	- 1- 0
S-ro F. Šlogar, Jugoslavio	- 5- 4
S-ino Agda Olsson, Svedujo	10- 7- 0
S-ro H. V. Rasmussen, Danlando	1- 0- 7

Stato je la 30-a de oktobro 1961 51- 9- 0

CED tutkore dankas al ĉiuj kiuj subtenis finance ĝian laboron. Donacojn por CED akceptas la C.O. de U.E.A., ĉiuj ĉefdelegitoj kaj perantoj, aŭ rekte la Oficejo de CED je la nomo de ĝia direktoro.

" GRAJNOJ EN VENTO"

La centro de "GRAJNOJ EN VENTO", la lernejaj rondoj internaciaj, komunikas :

La Respublika Junulara Komitato de SLOVENIA ESPERANTO LIGO en Ljubljana, Jugoslavio, akceptas gvidi la novan rondon de Grajnoj en vento por estontaj geinstruistoj. SEMINARIOJ, NORMALAJ LERNEJOJ, POR-INSTRUISTAJ LERNEJOJ en ĉiuj landoj, aliĝu al la nova rondo ! Aktive partoprenu, sendante al ĉi suba adreso en Jugoslavio tekstojn en 25 ekzempleroj pri via studenta vivo, viaj spertoj, pri pedagogiaj temoj, pri famaj homoj de via lando, pri ĉio — escepte de politikaj aferoj — kio povas proksimigi la homojn, laŭ la plej larĝa tolerema spirito. Sendu ankaŭ 25 desegnaĵojn (originalojn). Formato de la tekstoj kaj desegnaĵoj : 21 × 29,7 cm. Dato por la eldono de la unua komuna kajero : 1.3.1962.

Esperanto-Kluboj ankaŭ partoprenu kiel perantoj inter la estontaj geinstruistoj de via loko kaj la rondo ! Ĉiuj konsciigu, ke tiu ĉi propono estas aktiva kontribuo al pli rapida enkonduko de Esperanto en la lernejojn. Dank'al nia sistemo, la lernejoj kontaktiĝos per unusola kontribuo kun multaj landoj. La komunaj kajeroj aperas tri-foje en la jaro.

Gvidantino de la rondo al kiu oni sendu la verkaĵojn : F-ino Marjana Zrimšek, Rudnik 60, LJUBLJANA, Jugoslavio.

Por aliaj informoj pri "GEV" oni sin adresu al "Grajnoj en vento", Marcel Erbetta, rue des Pins 66, Bienne/Biel 7, Svislando (aldonante, se eble, internacian respondkuponon).

VERDIKTE PRI LA PREMIO "COMELLA-BASSOLS"

Pri la 3a Konkurso por la Premio "COMELLA-BASSOLS" ni havas la honoron sciigi ke la rakonto, LA KOKINEJO, de samideano Albert Samyn, el Belgujo, pro la plej alta atingita nombro da poentoj, rezultis la gajninto de la Premio.

S-ro Jacint Comella — kreinto de la Premio — kaj la Juĝinta Komisiono gratulas kore la premiitan aŭtoron, kaj multe dankas ĉiujn partoprenintojn.


D-ro Andreo Albault - S-ino Emilija Lapenna
Lluís Mimó kaj Francesc Vilà - Sekretario

Ŝaka Rubriko

(Gvidas : D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio)

Problemo n-ro 16 (konkursa problemo 7)

Mir. Soukup :



Mato en 3 movoj (pro ĝusta solvo 3 poentoj)

Kontrolo : Bl. : Rc6, Ta8, Tbl, Ca7, Cb5 (5)

Ni. : Ra4, Da5, p. : b6, c5 (4)

Solvojn al gvidanto de la rubriko ĝis 28-2-62.

Per tiu ĉi problemo finiĝas nia konkurso 1961. La novan konkurson ni malfermos en januaro.



F-ino Donka St. Petkova, eble la plej juna diplomita profesorino de Esperanto, gvidantino de la esperantistaj kursoj en urbo Loveĉ, Bulgarujo, kun la junaj esperantistinetoj Neli, Mimi kaj Veni.

AKTUALA KOMENTARIO

La lingvaj malfacilaĵoj ĉe la verkado de la plej nova encikliko.

La 15an de julio Papo Johano la 23-a publikigis sian jam delonge anoncitan enciklikon de la 25a de majo 1961 "Mater et Magistra" pri la katolika sociologio. Ĝia verkado kaŭzis konsiderindajn lingvajn malfacilaĵojn. Pri tio oni povis legi en la "Frankfurter Allgemeine Zeitung" de la 14a de julio 1961 la jenon:

"La origina teksto de la nova encikliko publicota estas itala, ne latina.

El la itala ankaŭ la tradukoj estas faritaj en la aliajn lingvojn. Estos interese por la latinistoj kompari, kiomgrade la latina teksto plenumas la postulojn kaj kiom ne. Ne temas ĉi-tie pri lernejanaj malperfektaĵoj. La nova realeco en la socialaj, ekonomiaj kaj teknikaj cirkonstancoj de la nuntempo postulas novajn nociojn. Kvankam la latina ankoraŭ ĉiam estas vivanta lingvo por la eklezia Romo, ĝi laŭŝajne ne efikas en ĉiu kazo kvazaŭ bastoneto, kiu pere de logiko disigas la nebulojn. Pius la XIa, ĉe "Quadragesimo Anno" decidis akcepti fremdvortojn en la latinan tekston, uzante ankaŭ la vorton Syndicatus. Ĉe la nova encikliko "Mater et Magistra" la latinistoj venkis. Por "sindikato" ĉi-foje estas uzita la cicerona "opificium" ne havanta la saman konkretan signifon.

En aliaj kazoj oni uzis pro la pure latina formo akcesorajn frazojn. Malgraŭ ĝia derivita karaktero la latina teksto, kiel ĉe la antaŭaj enciklikoj, konservis sian rolon kiel oficiala teksto. Por majstri la malfacilaĵojn de la interpretado kaj la kontroversojn certe rezultontajn el ili, oni sugestis, en tiaj kazoj ankaŭ utiligi la italan tekston. Laŭ ĝi estas faritaj la aŭtoritataj tradukoj en aliajn lingvojn. Tamen principa decido pri tio ankoraŭ ne estas farita. La decido antaŭ ne longe farita de la Centra Komisiono por la venonta koncilio allasi apud la latina ankaŭ la vivantajn lingvojn kvankam en subordigita vico, tamen tiamaniere ricevis postan pravigon".

Nia opinio:

La uzado de la latina lingvo, kvankam respektinda pro dumiljara tradicio, iom post iom fariĝas anakronismo. La spertoj ĉe la verkado de la encikliko montras, ke la revo de kelkaj esoteruloj, revivigi la latinan lingvon, neniam havos sukceson, des malpli, ĉar la eklezio bedaŭrinde sin vidas devigata, pli kaj pli redukti la uzadon de la latina lingvo ankaŭ en la liturgio.

Sen malutilo al sia liturgia lingvo la eklezio povus serĉi pli taŭgan lingvan instrumenton, ĉar por la gigantaj taskoj de mondeklezio la latina lingvo de jardeko al jardeko iĝas pli maltaŭga. Kial la internacia lingvo Esperanto ne povus anstataŭi la latinan en la administracio de la eklezio? La nova encikliko donas okazon atentigi, ke ekzemple la laboristaj esperantistoj evoluigis taŭgan terminologion por la ekonomiaj kaj sociologiaj sciencoj.

Oni jam povas antaŭvidi, ke dum la venonta koncilio la samaj lingvaj malfacilaĵoj aperos. La ekleziaj altranĝuloj regas senescepte la eklezian fakterminologion en la latina lingvo, sed laŭŝajne ne la latinan ĉiutagan lingvon, alie oni ne devus allasi ankoraŭ naciajn lingvojn. Sed kiu volas partopreni en la diskutado, devas unue majstri la lingvon de la ĉiutaga vivo. Tial jam delonge oni ne plu parolas pri la monopolado de la latina lingvo en la eklezio. Lingvaj malfacilaĵoj ne estas utilaj al la harmonia procedo de debatoj.

Sendube oni ne povas atendi, ke la partoprenontoj de la koncilio antaŭe ankoraŭ lernas fremdan lingvon, eĉ se ĝi estus pli facile lernebla ol la Internacia Lingvo; ĉar la ekleziaj altranĝuloj debatontaj en la koncilio, plej multe estas pli ol 50-jaraj, la plej influricaĵ 70-jaraj kaj pli aĝaj. Sed oni devus pensi pri la estonteco! La postulojn de la Tutmonda epoko jam komenciĝinta ankaŭ la

eklezio ne povas ignori. La ĉinoj donas ekzemplon. Ili estas rezignantaj pri sia arte valora skribo kaj iutage ili transskribos sian literaturon en la latinan skribon ĉar alie ili estus malhelpataj en sia vivbatalo.

Kial pro la samaj kialoj de praktikeco ne estu postulata de la eklezio la adaptiĝo al supernacia mondlingvo post la eluziĝo de la latina? Prepari tian adapton estas tasko laŭtempa kaj estontpromesa por la koncilio.

Por la pli juna generacio de teologoj la adapto estus tre facila afero. Ili bezonus por tio, ĉar ili estas edukitaj en la latina lingvo, nur malmultajn monatojn. Ili nur devus lerni la ĉiutagan lingvon de la internacia Esperanto. La fakterminologion liveras al ili la latina lingvo. Oni nur devus aldoni al la latinaj fakterminoj la finaĵojn uzatajn en la Internacia Lingvo. Ni citas kelkajn ekzemplojn: papo, kardinalo, episkopo, sacerdoto, eklezio, koncilio, encikliko, diocezo, paroĥo, sakramento, eŭkaristio, transsubstanciado, karitato ktp. La Internacia Lingvo havas simplan kaj ĉie la saman prononcadon. La latina lingvo ne estas ĉie prononcata same. Oni kunsidigu francon, anglon kaj germanon kiuj lernis la latinan lingvon en sia hejmlando. Ili ne komprenas unu la alian, nur la germano kun peno la francon kaj inverse. La ĉefa deziro de ĉiuj kristanoj, la reunuiĝo, ankaŭ postulas novan lingvan medion. Universala eklezio bezonas universalan lingvon facile lerneblan de ĉiuj popoloj en la mondo. Tia la latina bedaŭrinde ne estas!

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1961

Stato je la 31-a de oktobro

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	2860	3260	113,99
2.	Finnlando	2515	2515	100,00
3.	Britujo	6688	6643	99,33
4.	Svedujo	6325	6190	97,87
5.	Danlando	3002	2871	95,64
6.	Svislando	2120	1998	94,25
7.	Germanujo	7490	7055	94,19
8.	Usono	3660	3440	93,99
9.	Belgujo	2121	1953	92,08
10.	Hispanujo	2585	2377	91,95
11.	Italujo	4247	3830	90,18
12.	Francujo	7516	6719	89,40
13.	Nederlando	5716	4932	86,28
14.	Norvegujo	1993	1667	83,64
15.	Jugoslavio	7150	5560	77,76
16.	Brazilo	5100	3737	73,27

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Novzelando	965	1119	115,96
2.	Israelo	250	285	114,00
3.	Kanado	665	746	112,18
4.	Aŭstralio	1146	1148	100,17
5.	Portugalujo	535	515	96,26
6.	Aŭstrujo	1580	1440	91,14
7.	Madagaskaro	250	205	82,00
8.	Islando	250	205	82,00
9.	Argentino	960	505	52,60
10.	Sudafriko	375	175	46,67
11.	Urugvajo	250	115	46,00

NIA FORUMO

POLA RADIO

En la lasta numero de via leginda revuo "Esperanto" aperis anonco pri la esperantaj elsendoj de la Pola Radio, kiu povas iomete erarigi viajn legantojn. Nome, la Pola Radio ne elsendas nun "per alia stacio: Gdańsk", sed **krom** la Radio Varsovio, kiu elsendas ĉiutage en Esperanto, **ankaŭ** la alia stacio Gdańsk faras tion por sia loka aŭskultantaro kaj por la plej proksimaj regionoj de la najbaraj landoj.

Fakte, de la 15-a de oktobro, kelkaj niaj ondolongoj estos ŝanĝitaj, ni do petas, ke vi bonvolu anonci nian programon por la vintra sezono — kun la ondolongoj, kiujn vi trovos en la aldona flugfolio. Bonvolu ankaŭ represigi la kilociklojn indikitajn parenteze.

Samtempe ni informas vin, ke la elsendoj de Gdańsk estas nun disaŭdigataj ĉiulunde de la 7-a ĝis la 7,15 horo laŭ la mezeŭropa tempo.

Ni antaŭdankas kaj salutas vin samideane, dezirante al vi multajn sukcesojn en via laboro.

Kun estimo,

Sekretario de la Redakcio
Jerzy Grum

(La aluditaj ondolongoj estas : 31,01 m (9675 kc/s); 31,45 m (9540 kc/s); 31,50 m (9525 kc/s); 41,12 m (7295 kc/s); 41,99 m (7145 kc/s); 42,11 m (7125 kc/s); 48,43 m (6195 kc/s) kaj sur la meza 249 m (1205 kc/s). — Red.

JES, NI VERE BEZONAS LITERATURON!

Mi aĉetis kaj jam legis la libron "Songe Sub Pomarbo" de Julio Baghy. Al la demando "kial", mi povas facile kaj libere respondi, ke mi tion faris pro la fakto, ke libroj estas la "sango de l'vivo" de iu ajn lingvo. Sen libroj (literaturo) la "koncerna lingvo" mortus.

Generale la Esperantistoj, kiujn mi konas, lernis Esperanton pro ĝia literatura valoro. Certe — por la pli multaj el ni — por alproksimiĝi al la aliaj lingvoj, al aliaj popoloj, kaj al iliaj literaturaĵoj, Esperanto estas kvazaŭ "malferma Sesamo". La ĝenerala publiko ja ne povas lerni fremdan lingvon pro kelkaj kaŭzoj. La manko de tempo estas la unua (la plejmultaj el ni devas labori por nin vivteni); sekvas la kapablo, la energio, kaj plej grave la necesa entuziasmo, kiu certe mankas ĉe la granda plimulto! Restas tiuj, do, kiuj lernas fremdan lingvon "ne pro amo . . . , sed pro speciala celo sia". Tutkonsente, mi konas kelkajn

personojn, kiuj lernis fremdajn lingvojn pro speciala celo: unu lernis la germanan pro tio, ke li volas perfektigi en la biologio, alia la francan por ke li povu ĝui literaturaĵojn en la originalo, alia la hispanan nur por entute ensorbiĝi en unu el la plej grandaj mondverkaĵoj, nome "Don Quixote". Se mi mem havus la tempon kaj la energion mi lernus la italan pro mia granda simpatio al Dante kaj la Dia Komedio.

Jes, oni ja povas lerni Esperanton pro multaj kialoj, kaj certe unu el ili povas esti la "interkompreniĝo tutmonda". Sed por riski esti nomata naiva, mi demandu: Kiamaniere oni povus starigi tutmondan interkompreniĝon sen la uzado de la lingvo en ĉiuj kampoj de la internacia intereso? Certe la plej grava parto troviĝas en la belarto, kaj aliaj fakaj branĉoj, kiuj plejparte postulas la artan uzon de nia lingvo!

Ĝis nun UEA faris multege por la paco per la lingvo Esperanto. Ĉu oni supozas, ke tio estus ebla sen la grandaj alpaŝoj farataj en literaturaj direktoj? Unesko rekonas la gravecon de literaturo en la uzado de Esperanto en sia granda eduka projekto en Afriko, kie ruliĝantaj bibliotekoj trapenetas la malluman kontinenton por la unua fojo! UEA certe ne estus atinginta la atenton de la "homoj de la 17 ŝtatoj", se ĝi ne jam de longe firme sinestablis en la belarto. Nur pro la belarto oni atingas grandecon!

D-ro Zamenhof kreis la mirindan lingvon Esperanto por ke la mondo trovu interpacigon per amika interkompreniĝo, sed li estis la unua por montri la plej grandan aspekton de la lingvo internacia en siaj multaj verkaĵoj, kiuj estas samtempe humanistaj (pacemaj), religiaj, historiaj, romanecaj, dramecaj, ktp. Jes vere, li montris la vojon ne nur per la Originala Verkaro kaj la Biblio, sed ankaŭ ekz.: per Hamleto, kaj aliaj tradukitaj dramoj!

Julio Baghy antaŭ longe esprimis memevidentan veron kiam li proklamis, ke LA VENKO DE LA ESPERANTA LIBRO GARANTIAS LA TRIUMFON DE ESPERANTO!

Do, se ni nur iom pli konsideros kaj pripensos la fakton de la esperanta libro, pri ĝia literatura valoro, kaj la signifon de Esperanto mem kiel kultura lingvo, ni ne plu lasos nin fali en la reton de la trankvila indiferenteco, sed ni akceptos kaj agos laŭ la fundamenta konkludo, ke vere, LA VENKO DE LA ESPERANTA LIBRO

GARANTIAS LA TRIUMFON DE ESPERANTO!

En la mondo de la esperanta libro, ne ĉiuj Esperantistoj scias, ke ekzistas kaj floradas en la Kanariaj Insuloj de Hispanujo, unu el la plej gravaj eldonoj de nia kultura movado.

Tiu grava literatura entrepreno, nomata STAFETO, sub la kontrolo kaj direktado de Profesoro Juan Régulo-Pérez, alprenis la torĉon de la altemerita, sed nun jam longe mortinta hungara LITERATURA MONDO, kiam furiozis la dua mondmilito. Pro tio, neniam ĉesis funkcii la plej grava beletra entrepreno en Esperantujo!

En la beletra mondo, kiu estas samtempe idealista kaj literatura, ekzistas miloj da filozofoj kaj aŭtoroj kiuj, tra la jarcentoj, multe influis kaj influadas la pensmanieron de la homaro. Sed tiu "malgranda viro", kun la granda spirito, kiu genie influis kaj efikis, ĝis senprecedenta grado, sufiĉe larĝan tavolon da idealistaj homoj tra la mondo, restas unika en la historio de la homa evoluo.

Ni jam celebris la centjaran naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto, kaj ĉiuj Esperantistoj en la mondo sentas, diversmaniere, grandan respekton por nia majstro, D-ro L. L. Zamenhof. La plej bona maniero por montri tiun respekton troviĝas en la aĉetado de libroj. Kiam oni aĉetas librojn oni samtempe aŭtomate partoprenas en la propagando kaj la varbado! Tiamaniere ni ne devas timi pri la eventuala sukceso de nia movado. Se ni nur iomete supreniris el la mallumo, estas pro tio, ke kelkaj kuraĝis marŝi antaŭen en la sunlumon! Mi esperas, ke ankaŭ John Futran supreniros el la mallumo kaj aĉetos la jam amatan drameton de Julio Baghy, por ke li povu daŭre "alproksimigi homojn de bona volo, sed de malsamaj idiomoj... por interkompreniĝo tutmonda".

elkopo

ESPERANTLINGVA FILMO

La nova generacio eble eĉ ne aŭdis, ke iu amerika filmproduktejo jam antaŭ la lasta milito pretigis Esperantlingvan filmon, ĉar ankaŭ la filmproduktantoj sonĝas pri uzado de ununura lingvo! La filmo estis plurloke prezentita — domage, sed nature, — sen konsiderinda sukceso. La fiasko de antaŭtempa provo ne estas mirinda, ĉar esperantistojn oni devas serĉi per lupeo, dum filmprezentado bezonas amasojn. Tiun filmon jam ie surkovras la polvo, kaj saĝe utiligite povus esti propaganda trezoro. Oni povus ĝin probable malmultekoste prunti (eble eĉ aĉeti!) kaj okaze de U.K. kaj aliaj kongresoj projekcii. Krome estus taŭga okazo por samtempe propagandi en la gazetaro.

Esperanto-Propagando, Lund



NACIA ESPERANTO-MUZEO

KAJ BIBLIOTEKO

Ekspozicio, kiun oni vizitis el 10 landoj

Hungarujo faritan Zamenhof-buston el la jaro 1913 kaj alian eble la plej freŝan, skulptitan de F-ino Ilona Dudás en 1960. Impresplena estis la verko de juna artstudento s-ro István Zoltánfi, kiu simbolas la kompreniĝon inter la popoloj per Esperanto.

La dokumentekspozicio vekis grandan intereson (31 gazetartikoloj, informoj aperis pri HEMB kaj ĝia ekspozicio). Niaj samideanoj el la tuta lando pilgrimis rigardi ĝin, multaj el ili kun skribiloj kaj paperoj en la manoj faris notojn, precipe antaŭ la ekranoj, kie oni povis legi la opiniojn de la hungaraj scienculoj kaj famaj verkistoj pri Esperanto. Multaj admiris tiujn kvar desegnaĵojn, kiuj montris la funkciadon de UEA, aliajn altiris la statistikaj tabeloj pri la Esperanto-disaŭdigoj kaj la deklingva etimologia tabelego ktp. Speciala ekrano montris la salut-telegramojn, leterojn el kvin kontinentoj kaj super ili mondkarto indikis per diversakoloraj fadenoj la lokojn, de kie venis la salutoj kaj donacoj por HEMB.

Sed la plej multkoloran bildon proponis al la vizitintoj la diversaj Esperanto-gazetoj el kvin kontinentoj (aparte estis kolektitaj la fakgazetoj). Multaj rigardadis la grandegan vitrotablegon, en kiu estis ekspoziciitaj 600 verkoj el nia originala kaj tradukita literaturo. En apartaj montristabloj oni povis vidi la porinfanajn kaj junularajn librojn, la lernolibrojn, la fakvortarojn, la pac- kaj laboristmovadajn eldonaĵojn ktp.

La gastlibro de la dumonata ekspozicio atestas, ke pli ol 10.000 personoj el 10 landoj enskribis siajn nomojn, kiel vizitintoj. Sed kiom estis, kiuj ne enskribis siajn nomojn? Demandis unu sveda vizitinto. Nu, modeste taksante, almenaŭ trifoje pli!

Se ni jam menciis la gastlibron, ni rigardu ĝin kaj citu kelkajn rimarkojn. Jen la enskribaĵo de nia tre estimata

Okaze de la inaŭguro de la nova Hungarlanda Esperanto-Muzeo kaj Biblioteko en Szeged, dumonata Esperanto-dokumentekspozicio malfermiĝis en la impona kupolsalono de la urba kulturpalaco, la 23-an de Julio.

Ĉe la inaŭgura kaj malferma solenaĵo Antal Annus gvidanto de la urba kultursekcio diris hungare enkondukajn kaj salutvortojn al la 150 esperantistaj delegitoj el la lando kaj 90 gastoj en la nomo de la urba estraro kaj Somogyi-Biblioteko.

La festparoladon faris la prezidanto de la Hungara Esperanto-Asocio s-ano Julio Baghy, kiu emfazis al la grandanima helpo de la Internacia Esperanto-Muzeo kaj ĝia direktoro. La helppreta kaj altestimata direktoro de IEM s-ano Hugo Steiner pro lia alta aĝo ne povis partopreni la solenaĵon kaj anstataŭ li s-ano D-ro Ignác Balla, kiel la hungarlanda reprezentanto de IEMW interpretis la salutvortojn de s-ano Steiner al la nova instituto. En la nomo de Hungara Esperanto-Asocio, kiel ĝia vicprezidanto D-ro István Bácskai esprimis la ĝojon de la hungara esperantistaro, ke la nova instituto estis fondata en unu el la fajrujoj de nia landa movado, en urbo Szeged. En la nomo de la Pola Esperanto-Asocio kaj de la ĉeestintaj gastoj f-ino Zofia Czarnobaj salutis la novan muzeon kaj bibliotekon akcentante, ke ĉi tiu estas la unua nacia Esperanto-muzeo kaj biblioteko en la mondo.

Fine Prof. Ernó Farkas, la iniciatinto de HEMB kaj organizinto de la novtipa ekspozicio malfermis ĝin, telegramstile komentinte la esprimplenan materialon. S-ano Prof. Farkas substrekiis, ke ĉe la aranĝo de la dokumentekspozicio lia gvidprincipo estis: respeguligi ne nur la multflankajn rolojn kaj rezultojn de la internacia lingvo, sed ankaŭ mense infuigi, instigi la vizitantojn kaj aludi la neelĉerpeblajn eblecojn kaj perspektivojn, kiujn Esperanto proponas por la praktika kaj rapida interŝanĝo de spiritaj riĉaĵoj kaj de kulturfaktoroj.

Vere interesaj kaj konvinkaj dokumentoj ilustris la kreskantan rolon de nia lingvo sur la terenoj de diversaj sciencofakoj: bibliografio, geografio, medicino, interlingvistiko, pedagogio, matematiko ktp. La ekspozicio donis gustume efikan enrigardon al la aplikado de Esperanto ne nur en la komerco, industrio, poŝto, radio ktp., sed ankaŭ en la filmo-, muziko- kaj teatroarto. Krom la esperanto-rilata fotoekspozicio estis reprezentata eĉ la bilda arto. Oni povis vidi tie tre verŝajne la unuan en



s-ano Julio Baghy :

"La ekspozicio estas impona paŝo unua sur la vojo de plua evoluo, kiu realigos malnovan revon de la hungara esperantistaro — la "Hungaran Esperanto-Muzeon" —.

Speciale bone efikis la laŭfaka aranĝado de la kolektita materialo. Tio laŭdas la larĝan scion de s-ano Ernesto Farkas".

Opinio de unu el niaj lokaj veteranoj s-ano D-ro Aurel Bánlaci, kiu estas jam duonjarcenta esperantisto :

"La ekspozicio estas tre zorgeme kaj lerte aranĝita dank' al la fervora klopodo de s-ro Prof. Ernó Farkas, entuziasma inicianto de la Esperanto-muzeo kaj lerta kolektanto de ties valora materialo".

Sed ni ĉerpu ankaŭ el la opinioj de la junularo kaj samtempe el la eksterlandaj vizitintoj, nome de s-ano Jan Karwik el Szczin (Pollando).

"Kun profunda ĝojo mi vizitis ĉi tiun organizitan Esperanto-ekspozicion. Ĝis nun mi eĉ ne sciis, ke ekzistas en Hungarlando Esperanto-Muzeo kaj vere, vere ĝojigas min ĉi tiu scio, ke en Szeged, en urbo, kiun mi vizitas estas tiu muzeo.

La ekspozicio estas interesa. Ĝi enhavas multe da interesaj, precipe interesis min la malnovaj libroj, kiuj jam skribas nian Esperanto-historion, kronikon..."

La plej ĝeneralan kaj karakterizan rimarkon enskribis s-ano D-ro Lajos Márton :

"La laŭtema, laŭfaka kaj scienca aranĝo laŭdas la aranĝintojn de la ekspozicio. Ĝi donas historian trarigardon, eĉ ĝi entuziasmigas, klarigas, instruas kaj konvinkas. El la ĝishodiaŭaj vizititaj ekspozicioj ĉi tiu estas la plej bona, se mi povas diri : ĝi estas ankaŭ "la plej saĝa". Mi esprimas mian dankon pro la grandioza travivaĵo al ĉiuj, kiujn tio koncernas".

Fine ni interpretos la vortojn de la administranto de la freŝa instituto : "Ni hungaraj esperantistoj multfoje dankas kaj dankos al nia solidara amikaro en ĉiu mondparto, kiu dediĉis kaj dediĉos atenton al nia laboro kaj kiel-ajn helpis kaj helpos nian sukceson en niaj klopodoj". Eto

REMEMPENSOJ PRI UNU PRELEGVOJAĜO

Kiam antaŭ pli ol unu jaro — sub la aŭspicioj kaj kun la morala helpo de U.E.A. — mi kaj mia edzino komencis nian prelegvojaĝon tra dek landoj de Eŭropo, ni estis jam malnovaj kaj "harditaj" esperantistoj, sed tamen ne povis antaŭvidi la rezultojn de nia entrepreno.

Ni volis konigi la malproksiman kaj malmulte konatan Nov-Zelandon, nian novan hejmlandon, al Eŭropo, per ESPERANTO ! Do, ni havis du praktikajn celojn : Pli-proksimigi la loĝantojn de la antipodoj, unujn al la aliaj, donante persone akiritajn informojn pri "fabelaj" pejzaĝoj, naturo kaj homoj. Precipe pri la lastaj, montrante kaj pruvante, ke ni, homoj, ĉiuj estas baze kaj laŭ nature samaj, havante la samajn sentojn, dezirojn, aspirojn, kie ajn ni vivas sur tiu ĉi malgranda (hodiaŭ ni jam tiel devas nomi ĝin) terglobo nia !

La alia, kaj por ni, esperantistoj, gravega celo estis pruvi al la ankoraŭ ĉiam dubanta mondo, ke nia Esperanto jam fakte kaj plej efike funkcias sur ĉiu tereno kaj en ĉiuj medioj de la moderna mondo. Ni havas lingvajn barilojn en neniun lando kaj ni estas amikoj... eĉ sen (aŭ malgraŭ) la politikistoj, kiuj ĉiam "akcelas" la proksimiĝon de la homaro, sed ni jam delonge man-en-mane iras kune, antaŭen !

Ĉu ni sukcesis atingi nian celon kaj en kia grado, pri tio niaj karaj gesamideanoj en 10 landoj, 98 urboj estas kompetentaj opinion diri, tiuj, kiuj kun entuziasmo aŭskultis la 138 prelegojn kaj prezentadojn, faritajn de iliaj antipodaj gesamideanoj. Krome tiuj multaj miloj da ne-esperantistoj, kiuj mirigite poste rekonis kaj aprobis la potencon de nia lingvo — sekve de la prelegoj, kaj prezentadoj.

Sed tiu ĉi estas nur unu flanko de la medalo : Sur la

alia, — por ni, persone, same valora — surskribite kaj neforigeble engravuritaj estas niaj propraj spertoj ! Kaj tiajn spertojn (mi devas akcenti) neniun alia mondvojaĝanto povas akiri, nur verdstelano !

Estas feliĉuloj, kiuj povas aranĝigi por si tutmondan vojaĝon pere de la plej grandaj kaj eminentaj vojaĝoficejoj de la mondo kaj tiuj zorgas por ili pri biletoj, hoteloj k.t.p. Sed mi ankoraŭ neniam aŭdis pri tio, ke tiuj vojaĝoficejoj kapablis zorgi kaj akiri por siaj vojaĝantoj, krom hoteloj kaj biletoj ankaŭ... amikojn ! Tion kapablas nur nia Esperanto aranĝi ! **Kaj tiel okazis al ni !** Senescepte en preskaŭ cento da stacidomoj, ĝis tiam nekonataj geamikoj atendis nin, kiuj manpremite tuŝe ekkaptis niajn 7 pezajn valizojn kaj ame portis ilin, al niaj hejmoj. Jes, ĉar ni devas konfesi, ke en Eŭropo ni havis 98 hejmojn kaj ni estas certaj, ke ni estus povintaj havi ankoraŭ alian centon da ili, se nia tempo tion estus permesinta !

Estas homoj, kiuj kolektas monon, aliaj poŝtmarkojn, alumetetikadojn aŭ multspecajn aliaĵojn. Ni, dum nia vojaĝadoj ekkolektis... geamikojn ! Kaj dankon al nia kara lingvo, nia kolektado tiom bone sukcesis, ke nun, hejmenveninte, ni povis (kaj devis) 242 salutleterojn skribi al nove-akiritaj, **personaj, plej bonaj geamikoj**, kiuj ĉiuj superŝutis nin per sia amo kaj amikeco. (Sed ĉi tie mi devas pardonpeti de niaj multaj, **malnovaj**, same karaj, esperantaj geamikoj, kiuj — kun rajto, mi konfesas — riproĉas nin nuntempe : "Vi forgesis nin, pro viaj novaj geamikoj !" ... Ne, niaj karaj, ni nek vin forgesis, ĉu vi vivas en Budapeŝto, ĉu en Amagasaki ! Vi estas samaj al niaj koroj, kiel ĉiam, sed... **la tago havas nur 24 horojn !**)

Sed krom amikoj ni kolektis ankaŭ spertojn per nia Esperanto. Multajn, interesajn. Kompreneble, ni konatiĝis kun la belegaj urboj, pejzaĝoj de la malnova Eŭropo, lernetis la historiojn de la diversaj landoj. Ni rigardis kaj admiris lokojn, kie unu heroo nacio venkis la alian, kaj post kelkaj tagoj ni gavis ĉe la "venkita" nacio al la loko, kie ili venkis siajn venkintojn !... Sed ni ĉie vidis nur similajn ruinojn, kiuj pruvis al ni la potencon de la... tempo !


Konate, ke ankaŭ inter la esperantistoj estas multaj kolektantoj. Kompreneble, ankaŭ ni renkontis poŝtmarklibro-, glumarkkolektantojn (monkolektantojn nur malmultajn, inter samideanojn). Sed krom tiuj ĉi konataj "ŝatokupoj" ni renkontis kelkajn nekutimajn. Ekzemple la juna filineto de unu nia kara samideano kun fiereco montris al ni sian kolektaĵon de **vivantaj araneoj**, diversspecaj kaj -grandecaj. Ŝi tenas ilin en konfitaĵ-konservglasoj de sia panjo kaj ĉiutage mem kaptas freŝajn muŝojn por ili. (Mi forgesis demandi, vintre per kio ŝi nutras ilin ?)

Unu alia kolektaĵo estis jam senmova, sed same ne ĉiutaga, kiun nia samideano, (eminenta esperantisto kaj organizanto) montris al ni kun simila fiereco : Kolektaĵo de kranioj. — Kiom da kranioj li havas, mi eĉ ne kuraĝis kalkuli. Sed ili troviĝis ĉie en lia ĉambro : bele, en ordo vicigite sur lia tablo kaj sur la noktoŝranko apud lia lito !

Sed la plej ĉarman kolektaĵon ni trovis ĉe vi, niaj karaj nederlandaj gesamideanoj, kaj ni estis tre feliĉaj ludi, paroli kaj esti inter ili ! La tuta kolektaĵo konsistas nur el ses "pecoj", sed ĉiu el tiuj estas pli valora, ol la plej grandaj diamantoj de la mondo ! Kaj ĉiu havas, memkompreneble nomon, la plej belege sonantajn, por niaj esperantaj oreloj : Donata, Benata, Feliĉa, Espero, Paĉjo kaj Panjo. Se iu ankoraŭ havas dubon, ĉu Esperanto estas taŭga kiel familia lingvo, vizitu ilin, parolu kun ili kaj aŭskultu la esperantlingvajn kantetojn kaj preĝojn de la 4-jara Feliĉa kaj ŝiaj gefratoj, tiu konatiĝos ankaŭ kun la feliĉo, pere de nia lingvo !


Ni aparte la rezulto estis : Ni hejmen venis plisaĝiginte, kaj firmiĝinte, ke Esperanto ne estas nura "moderna kontaktilo", sed unu el la plej efikaj rimedoj por kunligi la homaron !

D-ro Johano Hamvai,
Auckland, Nov-Zelando



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :
Heinrich Reiter, Van der Nüllgasse 100/10/15
Wien X, Aŭstrujo.



r = radiko, m = mallongigo.

Horizontale :

1. Superforte forpreni ies posedaĵon; supra parto de objekto (r); nekurba (r). 2. sufikso esprimanta daŭron; malhumila (r). 3. travidebla marko en bankbileto (r); malkonfuza. 4. montra pronomo; grupo, kolekto (r); Esperanta Ronado (m). 5. Rapisdribanto per specialaj signoj (r); 6. pasinta; pinthava instrumento. 7. parto de skeleto; al tiu loko. 8. prefikso por ambaŭ seksoj kune; persona pronomo; parto de noto; Esperanta Kongreso (m). 9. maljes; dufoje la sama litero. 10. surprizigos; doni manĝaĵon aŭ trinkaĵon al gasto (r). 11. biblia ĝardeno (r); rigida direk-

tebla balono. 12. uzata por ŝmiri feron kontraŭ rustiĝo (r); troviĝas en la vorto Italujo. 13. okupo (r); ne pli multe; malpuŝi.

Vertikale :

1. flavruĝa (r); ŝaffelo preparita por skribado dum mezepoko. 2. participa sufikso; naskito (r). 3. antikva militmaŝino; movi per malgrandaj sinsekvaj skuoj. 4. nelogika aparta vortkonstruo (r); enkonduki (r). 5. ĉesigi bruladon (r). 6. sankta libro de mohametanoj (r); tre ruĝa koloriga substanco (r). 7. ŝakluda termino (r); kondiĉa konjunkcio. 8. nutraĵo (r); malgranda kvanto da fluaĵo (r); prepozicio esprimanta instrumenton. 9. laŭkutime. 10. granda ŝtono (r); kampa supraĵo; plej elektitaro (r). 11. Speco de marfiŝo (r); malkvietigi. 12. parto de arbo; membro (r). 13. alta konstruo (r); scienco pri konkvoj (r).

Karaj geamikoj: Sendu la solvon ĝis plej malfrue la 25-an de Januaro 1962 al la redaktoro. Atendas du libro-premioj, donacitaj al ni de la fondintodirektoro de la Internacia Esperanto Muzeo Wien, kortega konsilisto Hugo Steiner.

Mi petas ankaŭ, sendu pluajn kontribuojn, informojn kaj raportojn, interesajn por nia internacia rondo! Samtempe mi dankas al ĉiuj, kiuj jam helpis al mi per kontribuoj, ankaŭ se tiuj ankoraŭ ne aŭ ne komplete estas aperigintaj. La supra enigmo estas sendita de nia esperanta onklo A. D. Cook el Britujo.

7-Internaciaj Skiferioj kaj 5-aj Internaciaj Skikonkursoj de T.E.J.O. en FILZMOOS, Aŭstrujo

Nia vintra renkontejo estos: Filzmoos kun siaj skikampoj, montoj kaj trankviliga, belega naturo. Karaj geamikoj, junaj kaj junkoraj, jen la prognozo por la ĉivintraj skiferioj kaj konkursoj: Ili estos ankoraŭ pli *internaciaj*, ankoraŭ pli *kompletaj*, ankoraŭ pli *amuzaj*, ankoraŭ pli *neforgeseblaj* ol la antaŭaj! Jam aliĝas multaj junaj geamikoj el diversaj landoj!

Vi kaj Viaj geamikoj nepre ĉeestu! Informiĝu, aliĝu!

La skiferioj okazos en 4 etapoj de la 26-a de Decembro vespere ĝis la 28-a de januaro tagmeze.

1-a kaj ĉefetapo : 26. 12. — 7.1. (kun la skikonkursoj);

2-a kaj familia etapo : 7. — 14.1 (ĉiuj estas bonvenaj);

3-a aŭ Nord-Sud-etapo : 14. — 21.1.

4-a aŭ trankvila etapo : 21. — 28.1.

Al ĉiuj etapoj ĉiuj estas bonvenaj, ĉu familioj aŭ unuopuloj, ĉu sud- aŭ nordlandanoj; la etapotitoloj nur esprimas dediĉojn. Gejunuloj malpli ol 25 — jaraĝaj pagos 55. — aŭstr. ŝilingojn, pli aĝaj personoj 60. — ŝil. po tago kaj persono.

La programo estas varia kaj interesa kaj respondas al la nomo de la aranĝo: Ferioj!

Je dispono estos ĉijare ankaŭ nova radioaparato kun gramofono: Kunportu do, geamikoj, Viajn favoratajn sondiskojn!

Kiu pensas al vintroferioj, pensas al la *skiferioj de TEJO*! Kiu sopiras al bela, internacia skisportvilaĝo, sopiras al *Filzmoos*! Kiu deziras internacian esperantistan atmosferon, deziras partopreni la internacian skiferion en Filzmoos, al kio kore Vin invitas la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

Aliĝu tuj, sendante *antaŭpagon de 40%* de la tutaj kostoj al Heinrich Reiter, Wien X., Van der Nüllgasse 100/10/15, Aŭstrio.

OFICIALA KOMUNIKO DE LA ESTRARO

Kiel estis anoncite en la novembra numero 1960 de "Esperanto" (paĝo 199), ekde tiam la provizora adreso de la Serva Centro de UEA estis ĉe Mag. Bruno Keppeler en Genevo.

Dum la Kongreso en Harrogate estis nomita nova administranto de la Serva Centro, nome S-ro J. J. Sturzenegger (vidu la septembran numeron 1961 de "Esperanto", paĝo 155). S-ro Sturzenegger estas komitatano de UEA nomita de la svisa landa asocio (Svisa Esperanto-Societo) kaj kasisto de la sama organizaĵo.

En Svislando la titolo de la Serva Centro estas en franca lingvo "Bureau International de l'Esperanto". Ĉiuj korespondaĵoj, petoj, pagoj, informoj ktp. por la Serva Centro de UEA estu direktitaj nur al S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich 57, Svislando, por ke ili atingu la celon.

La Estraro

FRUE PAGU VIAN KOTIZON 1962!

Tra la Mondo

Bulgarujo

● **La esperantista societo "Espero"** en urbo Loveĉ malfermis du esperantajn kursojn por komencantoj: unu por geurbanoj, gvidata de s-ro K. P. Pancev, kaj alian por gelernantoj de la Mezlerneja Politeknika Lernejo, gvidata de f-ino Donka St. Petkova, diplomita profesorino de Esperanto.

Ĉeĥoslovakio

● **En 9-jara meza lernejo en Králíky** oni komencis instrui nedevige Esperanton al 25 lernantoj. Ni petas ĉiujn esperantistojn sendi gratulesprimon al la direktoro de la lernejo kaj per salutkartoj plifortigi entuziasmon de la gelernantoj. Ĉiu ricevos respondon. Supra adreso sufiĉas.

● **Esperanto-rondo en urbo Kojetín** intencas eldoni kolekton da fotografaĵoj el naturo akompanitaj de poemoj de ĉeĥa poeto Vítězslav Hálek en esperanta traduko de s-ano Jiří Kořínek el Brno. Kiu deziras la albumon havi, sendu vian mendon al jena adreso: Dum osvěty (esperanto), Kojetín, Ĉeĥoslovakio. La prezo estos ĉ. 200 Kčs.

Finnlando

● **En ĵurnalo "Kansan ääni" (Waasa)** de la 7a de oktobro aperis intervjuo kun f-ino Olga Ihander kiel instruistino en laborista instituto. Ĝis nun en tiu Instituto oni estis indiferenta al Esperanto, sed ĉi-aŭtune venis nova,

juna estro, kiu interesiĝas pri la lingvo kaj mem lernas ĝin kiel membro de la kurso starigita de f-ino Ihander. Dume la ĵurnalo "Keski-Pohjalainen" daŭrigas sian serion de tradukoj el "Esperanto" faritaj de f-ino Ihander. La du plej novaj estis: "Nepalaj bronzoj" de Tibor Sekelj kaj "Renkontoj" de d-ro J. W. Herfst. La sama ĵurnalo ankaŭ raportis pri la supre menciita kurso.

Francujo

● **La biologo Jean Rostand**, membro de la Franca Akademio, skribis lastatempe pri nia movado: "...Laborante por disvastiĝo de Esperanto, oni ankaŭ laboras por plibona transsendo de l' scio kaj reciproka kompreno de la popoloj. La unueco de la Homa Genro postulas komunan lingvon. Persone, mi opinias, ke la tempo estas proksima, kiam ĉiuj homoj povos interrilati per Esperanto".

● **Regiona kongreso okazis en Valenciennes** (Norda Francujo) sub la patronado de s-ro Carous, urbestro, vicprezidanto de la Franca Parlamento. I.a., la ĉeestintoj diskutis pri la rilatoj kun najbaraj landaj asocioj. Laŭreatoj de la ekzamenoj ricevis premiojn de la Federacia komitato. Notinde estas ke s-ro Roger Bocquet (Lille) sukcesis en 1961 la tri ekzamenojn de la Franca Esperanto-Instituto.

● **En siaj eldonoj de Roubaix-Tourcoing**, tri tagaj gazetoj publikigas ĉiusemajne informojn pri Esperanto. Temas pri "Nord matin", "Nord Ec-lair" kaj "La Voix du Nord".

● **Perpignan: 4 prelegoj, 4 novaj kursoj por 180 gelernantoj.** S-ro René Llech-Walter, Prezidanto de Unuiĝo Esperantista Franca, faris dum la monato oktobro kvar prelegojn pri Esperanto kun provleciono ĉe la Porinstruista Seminario de Perpignan kaj ĉe la Metiaj Lernejoj de Perpignan, Espira de l'Agly kaj Rivesaltes. Oni scias, ke ĉe la Porinstruista Seminario la Esperanto-kurso estas deviga por la lernantoj de la unua jaro kaj nedeviga por la ceteraj. En la Metiaj Lernejoj de Rivesaltes kaj Espira (apud Perpignan) la kursoj estas devigaj. Ĉeestis tiujn prelegojn kaj provlecionojn 180 gelernantoj.

Grekujo

● **Sub titolo "Internacia scienca lingvo"** eminenta universitata profesoro aperigis en unu el la plej seriozaj gazetoj de Grekujo longan artikolon favoran al Esperanto. Li priskribis la malfacilaĵojn en internaciaj kongresoj kaj sciencaj kunvenoj kaj la malakcepton flanke de la grandaj nacioj de unu komuna lingvo. Li konsilas devigan instruadon de Esperanto en la lernejoj. Kaj ĉar la grandaj ŝtatoj ne volas apliki tian planon, povas la malgrandaj ŝtatoj havi la iniciaton.

Germanujo

● **Fervojistoj en Heidelberg.** La 5a jarkunveno de la Germana Fervojista Asocio (GEFA) estis aranĝita la 13an-15an de oktobro 1961 en Heidelberg. Partoprenis pli ol 140 esperantistoj



La Esperanto-grupo Würzburg (Germanujo) aranĝis dum la semajno de la 17a ĝis la 24a de septembro intensan varbkampanjon. Per gazetartikoloj, presaĵoj kaj afiŝoj (la lastnometaj eĉ en la tramoj) oni atentigis la publikon pri Esperanto kaj la diversaj aranĝoj de la grupo. En du grandaj montrofenestroj de la Urba Biblioteko (en la famekonata "Falkenhaus") kaj de la Arena--Librejo (en la ĉefstrato de la urbo) okazis Esperanto-ekspozicioj. Krom diversaj vortaroj kaj studlibroj oni montris multajn konatajn verkojn de la E-literaturo, E-gazetojn kaj revuojn el 24 landoj, vojaĝprospektojn, E-poŝtmarkojn kaj — kiel videblan pruvon pri la mondvasta korespondado de la grupo — multe da bele afrankitaj leteroj kaj bildkartoj, ligitaj per multkoloraj fadenoj al la devenlokoj sur granda mondkarto. Inter la montritaj libroj troviĝis ankaŭ valoraj maloftaĵoj kiel ekz. ekzemplero de la Esperanto-traduko "La Fino" de grafo Folke Bernadotte, kun ties propramana, esperantlingve skribita dediĉo



kaj subskribo. La kulmina aranĝo de la semajno estis bone vizitata Germanlingva publika prelegvespero, kiu okazis la 22an de septembro en la salonego de la "Studenthaus". Ĉefparolanto estis d-ro Wilhelm Herrmann, prezidanto de la Germana Esperanto-Asocio kaj Estrarano de U.E.A., kies temo estis: "La Internacia Lingvo — ĝia ekesto, evoluo kaj ĝia praktika kaj kultura valoro". La loka gazetaro (tri gazetoj kun proks. 130.000 abonantoj), kiu jam dum aŭgusto publikigis grandajn artikolojn pri la Kongreso en Harrogate, raportis ankaŭ tre detale kaj pozitive pri la ekspozicioj kaj la prelego de d-ro Herrmann. Dum la lastaj du monatoj aperis en la loka gazetaro ok artikoloj pri Esperanto. Niaj fotoj montras (maldekstre) la ekspozicion ĉe Arena, kaj (dekstre) d-ron Herrmann preleganta. (Fotoj: Foto-Aumeier Würzburg.)

el 8 landoj. La programo estis kiel eble plej varia, por prezenti al ĉies gusto ion. La celo de tiuj aŭtunaj kunvenoj ne nur estas reciproka interkonatiĝo, sed ankaŭ uzado de la Internacia Lingvo, precipe por la komencantoj, por ke ili trovu la kuraĝon partopreni la internacian fervojistan kongreson dum la sekvonta printempo. En 1962 la internacia kongreso okazos en Hungarujo, kaj en 1963 en Britujo.

● **En GDR la Ministerio por Enlandaj Aferoj** la 12an de januaro 1949 decidis dekreton, kiu ek de tiu tempo preskaŭ malebligis aranĝon de kursoj, organizon de grupoj kaj aperigon de artikoloj por Esperanto. Sindonaj samideanoj senĉese klopodadis nuligi tiun dekreton. Tio fine sukcesis. Depost la 1-a de septembro 1961 la dekreto ne plu ekzistas.

Jugoslavio

● **"Jugoslavia Fervojisto"** estas monata organo de Jugoslavia Asocio de Fervojistoj-Esperantistoj. Tiu ĉi bela revuo aperas jam ses jarojn regule, kaj ek de la numero 5/1961 ĝi estas presata sur bona papero, riĉe ilustrita sur 24 paĝoj en granda formato. Estas menciinde, ke ek de la numero 1/1962 ĝi publikigos en daŭrigoj "Historion de la Esperanto-movado en Jugoslavio" de Marinko Ĝivoje. Jarabono por eksterlando estas 1 dolaro aŭ egalvaloro.

Nederlando

● **La 8a Beneluksa Kongreso de Esperanto** okazos en Hago dum la

pentekostaj tagoj 1962. La kongreskotizoj estas jenaj (la dua cifero inkluzivas du tranoktadojn kaj du matenmanĝojn — la prezoj de la hoteloj por unu tranoktado varias de f 8,50 ĝis f 16,— ! !): ĝis 31-XII-1961 f 10,—, f 18,50; ĝis 31-III-1962 f 12,50, f 21,—; ĝis 15-V-1962 f 15,—, f 23,50. Oni jam nun anoncas la kongreson por ke la gekongresontoj kaptu la okazon unikan tranokti je tiuj treege malmultekostaj prezoj, je kiuj la kongreskomitato povos prizorgi la tranoktadon nur por 100 kongresanoj. Skribu jam nun al la sekretariino: s-ino I. M. J. Dijkhoff-Lenze, van Trigtstraat 20, 's-Gravenhage.

Norvegujo

● **La gazeto "Haugesunds Avis"** dediĉis multe da spaco al la 46a UK de Esperanto. En ĝia numero de la 14a de oktobro aperis longa artikolo kun fotoj pri la Kongreso mem, kaj en ĝia numero de la 21a de oktobro aperis dua longa raporto, denove kun fotoj, ĉifoje de la Infana Kongreseto kaj la jugoslaviaj dancistoj.

Usono

● **En la gazeto "The Kenosha Labor"** aperis grava artikolo de Mark Starr kun la titolo "Breaking through the language barrier" (Trarompante la lingvan barilon), kiu enhavis multajn novajn faktojn pri la lingva situacio en la mondo kaj la nesufiĉajn eblecojn eĉ de la usona registaro por venki la malfacilaĵojn. La artikolo aperis en du partoj.

● **Pli ol tridek mil Rotarianoj** el multaj landoj partoprenos en la Internacia Kongreso de Rotario en Los Angeles, Kalifornio, dum la unua semajno de junio 1962. Ĉar la celoj kaj idealoj de Rotario estas similaj al tiuj de Esperanto multaj Rotarianoj estas ankaŭ esperantistoj. Antaŭ du jaroj, dum la kongreso en Miami, Florido, pluraj Rotarianoj proponis Esperanton, sed ĝi ne ricevis sufiĉe da subteno por esti oficiale akceptita. Dum la venonta kongreso oni denove prezentos la Internacian Lingvon. Pro tio, tiuj Rotariaj amikoj de Esperanto kaj la esperantistoj de Los Angeles deziras ekscii kiom da esperantistoj partoprenos tiun kongreson, por organizi specialan grupon kaj fari necesajn aranĝojn. Tiaj Rotarianoj bonvolu informi: s-ron Charles Chomette, 8525 Saturn Street, Los Angeles 35, Calif., kaj ankaŭ la centran oficejon de Rotario en Evanston, Ill., Usono.

ESPERANTISTA VIVO

Geedziĝo

Tressel. F-ino Luise Tressel, filino de s-ro Hans Tressel, Del., HM de UEA, München, edziniĝis la 30an de septembro 1961.

NEKROLOGO

Fischer. Mortis s-ino H. Fischer, Bern. Ŝi fondis kaj estris la svisan esp-instituton en Bern.

Jayet. Mortis s-ro Ch. Jayet, Morges, Svislando, HM de UEA kaj SES.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM-2 NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

N-ro 343

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de oktobro kaj ankaŭ por komparo je la fino de oktobro 1960.

	1960	1961
Asociaj membroj	17261	17999
Individuaj membroj		
MJ	833	823
MA	5024	5233
MS	564	478
Pat.	5	2
DM	354	416
HM	43	43
J-MJ	29	32
J-MA	188	169
	7040	7196
	24301	25195

DELEGITOJ

Aŭstralio
Melbourne FD (Kvakerismo): vakas.
Britujo
London FD (Edukado): vakas.
Finnlando
Mikkeli VD: vakas.

FD (Liberkristanismo): vakas.
Francujo
Le Havre FD (Asekuro): vakas.
Hispanujo
Barcelona FD (Asekuro): S-ro Rafael Gisbert, asekuristo, Av. Generalísimo Franco, 338, 2., 2a.

Saldaña (Palencia) D: S-ro A. Diez Garcia, komercisto, Conde de Garay, 28.

Israelo

Tel-Aviv FD (Jurnalismo): vakas.

Norvegujo

Frederikstad (Østfold) D: vakas.

Horten (Vestfold) D: vakas.

Polujo

Bielsko-Biala (Woj. Katowice)

JD: vakas.

Gdynia (woj. Gdańsk) VD: vakas.

Ilża (woj. Kielce) D: vakas.

FD (Fotografado): vakas.

Katowice VD: vakas.

FD (Kinematografio): vakas.

Myszków (woj. Katowice) D: vakas.

Opole Śląskie D: vakas.

Sandomierz D: vakas.

Szczecin FD (Turismo): vakas.

Szopienice (woj. Katowice) D: vakas.

Tarnów (woj. Kraków) D: vakas.

Warszawa VD: vakas.

FD (Filatelio): vakas.

FD (Filozofio): vakas.

FD (Komerco): vakas.

Wrocław FD (Literaturo): vakas.

Złotoryja (woj. Wrocław) D: vakas.

Svedujo

Malmö (Skåne) JD : vakas.

Ystad (Skåne) FD (Jurnalismo): vakas.

Svislando

Bern FD (Hoteloj) : vakas.

Usono

Van Nuys (California) D : vakas.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Wieners, H., Höxter/Weser, Germanujo.

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1961

473, Stenberg, S-ro B., Falkenberg, Svedujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1962

1. Maddern, S-ro I. T., Morwell, Vic., Aŭstralio; 2. Andresen, S-ino H. L., Fredericia; 3. Andresen, S-ro S., Fredericia, Danlando; 4. Helfers, S-ro F., Karlsruhe; 5. Hollnagel, D-ro Ing. W., Hamburg; 6. Jaehn, S-ro W., Düsseldorf; 7. Pilhofer, S-ro Otto, Nürnberg; 8. Raab, S-ro J. M., Nürnberg, Germanujo; 9. Jerkovič, Ing. B., Beograd, Jugoslavio; 10. Hackett, S-ro W. D. B., Toronto; 11. Henderson, S-ino D. M., King; 12. Lewis, S-ro H. J.,

Halifax; 13. Salt, F-ino B., Calgary; 14. Tuch, S-ino R., Toronto, Kanado; 15. Aspin, S-ino H., Wellington, Nov-Zelando; 16. Antunes, S-ro J., Lisboa; 17. Serra, D-ro P., Aveiro, Portugalujo; 18. Andjans, S-ro J., Riga, Sovetunio; 19. Hughes, S-ro A., Hillsboro, Usono.

DONACO AL A.P.O.

S-ro L. Puig, Hispanujo, 2,50 gld.

DONACOJ AL INTERNACIA ARTA TEATRO

S-ro L. Puig, Hispanujo, 3,60 gld., S-ro H. Groendijk, 5 gld., F-ino A. Laverman, 5 gld., Nederlando; S-ro J. Gamble, Usono, 35,90 gld.

FONDAJO UNIVERSALA EKSPozICIO

S-ro F. Ramolfo, Torino, 5,88 gld.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo 18.671,20 gld.

S-ro F. Ramolfo, Italujo, 5,88 gld.; S-ino H. Bouwman, Nederlando, 5,— gld. Entute 18.682,08 gld.

Daŭrigu vian kontribuadon por subteni la plian agadon de la Asocio, por

firmigi la poziciojn akiritajn dum la Zamenhof-Jaro!

FONDAJO DOMO

S-ro N. G. Nilsson, Svedujo, 66,45 gld.

DONACOJ

AL ĜENERALA KASO

S-ro Charlet, Francujo, 7,40 gld.; S-ino Willems, Nederlando, 2,— gld.

FONDAJO PROF. CANUTO

Antaŭa stato: 241 MA, 30 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA.

"Noktaj Gekukuloj", Finnlando, 1 MA; S-ro J. Pyykönen, Finnlando, 1 MA; S-ro F. Ramolfo, D-ro Prof. G. Campetti, S-ro G. Lucchetta, S-ro A. Rossino, ĉiuj Italujo, kune 3 MA, 1 MJ.

Entute: 246 MA, 31 MJ, 6 J-MJ kaj 1 J-MA

Ĉiuj kontribuu por membrigi esperantistojn en nepagipovaj landoj, honore al la nobla prezidinto de U.E.A. (Vidu dec. no. "Esperanto", 1960).

Al ĉiuj donancintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

AVERTO! Nek la redakcio, nek UEA iel ajn respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, aŭ pri plenumado de promesoj faritaj en ili. Tio aparte koncernas poŝtmarkkolektantojn.

Mi bezonas kunlaboron de esperantistoj por organizi en ĉiu lando Iniciativan Agentejon (enlanda kaj eksterlanda komerco; turismo; reklamado; informa kaj komerca tekniko; solvo de transportaj kaj ekonomiaj problemoj; reprezentado; ktp.) Ankaŭ mi akceptus kunlabori en similaj organizaĵoj. Oni ne bezonas koni la komercan mondon nek havi kapitalon. D-ro V. Petro Signes, Monjas Clarisas, 20- Oliva (Valencia), Hispanujo.

Deziras aĉeti unuopajn numerojn, Literatura Mondo, 1931-1937. Skribu, indikante prezojn, al William Vathis, American Embassy, Madrid, Hispanujo.

Metaforo enradikiĝinta en popola idiom konsistigas gravan minacon. Esperantujo realiĝos nur kiam ekzistos laborebleco en supernacia medio. Estu nia devizo "Esperanto ankaŭ en la fabriko", asertas D. Soleo, 14B Castle Avenue, Dover, Britujo.

Belan frontispicon havas "William Penn" majstra prelego de Prof. E. Privat pri paca pioniro. 4 rpk. aŭ steloj. Kvakera Esperantista Societo, 5 Cotham Park North, Bristol 6, Anglujo.

La nova kristaneco, bazita je la doktrino de sciencisto kaj reformanto, E. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri vera religio bazita je la Biblio kaj ĝia interna senco. Ĝi akor-

igas la religion kun la scienco. Postulu traktatojn senpage. Aldonu, se eble, resp. kuponon. Adresu: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha II, Ĉeĥoslovakio.

Deziras interŝanĝi bildkartojn el tuta mondo, fotojn, literaturon, arton, alu-metetiketojn: J. Rode, Artilerijas 73-31, Riga, Latvio, USSR.

Deziras korespondadi k.ĉ.l. Vera Serĵane, Rueavas 16-4, Riga 17, Latvio, Sovetunio.

Ni atendas salutkartojn por nia letervespero (15-12-61). Respondo garantiata. Esperanto-klubo. Les Andelys (Eure), Francujo.

M. Raposo, caixa postal, 872, Lourenço Marques, Africa Oriental, dez. interŝanĝi P.K. nur pri kutimoj kaj kostumoj popolaj k.ĉ.l. cele al ekspozicio. Resp. garantiata.

Gekursanoj deziras korespondi eksterlande. Nepre respondo. S-ro P. J. Franzak, 901 Forest Ave., Pittsburgh 2, Pa., Usono.

Deziras korespondi membroj de Esp-klubo "Zamenhof". Respondo certa. Skribu amase al L. Wulfers, Lindanusstraat 16, Nijmegen, Nederlando.

Junulo 20-jara deziras korespondi k.t.m. pri ĉiuj temoj. Afranku filatele. Adreso: S-ro Henri Guillermond, 23, rue Turpin, Romans, (Drôme), Francujo.

Letervesperon organizas la 31-a regiona Kongreso (Rouen). Sendu amase bildkartojn. Nepre respondos S-ro Jouis, 67, rue G. Mugnier, Boisguillaume (Seine Mme), Francujo.

Amase! Subite! Sendu sanigilojn, kovrilojn, vestaĵojn, ŝuojn kaj manĝaĵojn al Ruĝa Alĝeria Lunfalĉilo, Rue de Serbie, Tunis.

Atenton! Atenton! Mi esprimas mian plej grandan dankon, al mia nobla, malavara kaj bonkora gastiganto kaj amiko s-ano Simon Saft el Salford, Lancs., Anglujo, kiu ebligis al mi viziti Anglujon kaj partopreni la 46-an U.K. en Harrogate. Koran dankon! Koran dankon al miaj gastigantoj, kiuj multe helpis al mi dum mia vojaĝo tra Anglujo, Nederlando, Belgujo kaj Germanujo; Anglujo: Simon Saft (Salford); A. W. Thomson (Welling); Douglas Bills (Dartford); Georgo Aitchison (Northampton); T. H. Cox (Reading); Jack Gibson (Stockport); John Armitage (Stockport); James Young (Gravesend); Ge-roj Wojtas (Manchester); Mary Larrad (Manchester); Nederlando: L. C. v. d. Meer (Schiedam); Belgujo: Elisabeth Spel-eers (Antverpeno); Germanujo: Jürgen Priess (Langelsheim); Claire Wolber (Bonn); Ge-roj E. k. R. Hirsch (Bad Hersfeld); Charlotte Holzmann (Hangelar); Ge-roj E. k. H. Herlitze (Bonn); Georg Kirsch (Bad Godesberg); J. Kleinlosen (Bonn); Frieda Michalik (Essen); E. Kisseler (Essen); P. H. Klein (Essen); Josefo Burger (Essen). — Jeannette Sidorak, Kamienica 167, k/Bielska-Białej, woj. katowickie, Polando.

Deziras korespondi: 40-jara s-ino H. kun Jap; 25-jara s-ro T. kun Ital.; 2 mezaĝaj fratinetoj K. kun Skand.; 55-jara s-ro R. kun Skand. kaj Germ.; 35-jara instr. s-ro A. kun Skand.; 20-jara s-ro Th. kun Jap., Sved. kaj Norv.; 30-jara s-ro B. kun Brit. (komenc.); mezaĝa f-ino B. kun Hisp., Ital. kaj Skand. Adreso ĉe s-ro H. Groendijk, Pontanuslaan 7, Arnhem, Nederlando.

LA ESTONTO APARTENAS AL LA INFANOJ

M. Miyamoto

Kiam foje, ekzemple ĉe la manĝotablo, nia konversacio trafas la militon, mia pli aĝa filo, nun 16-jara, rekte turnas sian vizaĝon al mi, kaj ĵetas al mi demandon iom draste:

— Kaj paĉjo, kial vi iris al la batalejo tiom kruela, se vi dekomence estis tia kontraŭmilitisto?

Ce tio restas al mi nur balbuto káj ekmuta, kvankam mi klopodas konvinki lin tiel kaj ĉi tiel, ĉiam la rezulto restas sama, kaj mi devas kapitulaci antaŭ li kaj lia pli juna frato silenta kun scivolemaj kaj mirantaj okuloj rondaj; mi povas neniel ilin konvinki.

Por tiuj, kiuj aŭ naskiĝis aŭ edukiĝis post la milito, estas neniel kompreneble ke ilia patro devis ĝemi sub la premo de la militarismo kaj post ĉia vana klopodo kontraŭ la milito li devis finfine cedi kaj rezigni kaj iri al la fronto, al Insulo Okinawa, la lasta batalejo de Pacifika Milito kaj samtempe la tombejo de la japana armeo, kaj ke li devis ĉiel barakti inter la vivo kaj morto.

Jes, ili neniel povas kompreni mian tiaman situacion sub la minacoj de sabroj kaj revolveroj nek mian vanan klopodon, kaj miaj plej energiaj admonoj prediki la respekton al la paco fine restas nur ridindaj; ili laŭvorte povas kompreni miajn vortojn, tamen laŭ la korpo kaj sango ne povas percepti tion. Jes, ili povas kompreni kiel ilia patro laboris por kontraŭi la militon, sed laŭ ili tiaj restas fine nur ia sceno el rakontoj de malproksima lando.



Tamen ili estas ĝisfunde demokratoj kaj pacistoj; ili akceptas la pacon en la nuna stato (bedaŭrinde ne konsekvenca) kiel naturan aferon; por ili milito estas nekomprenebla kanibalaĵo, dum ili ne povas tion kompreni; jes, jam tia kompreno mem estas tute superflua por ili. Ili ne povas malami la japanan barbarismon, sub kiu ilia patro estis apenaŭ ne mortigita, ĉar post ĉio miaj vortoj ne havas realecon por ili. Konvinki ilin pri la krueleco de la milito estas preskaŭ neeble. La pli aĝa jam legis "Taglibro de Anne Frank" aŭ "Taglibro de David" sed por li ilia barakto restas nur eksterlanda fenomeno aŭ historia akcidento; li legis la terurajn librojn kvazaŭ ian fikcion kaj ilia brava konduto por li restas kvazaŭ heroaĵo en romano.

Nun, mi aŭdas, japanaj infanoj kreskiĝas tiaj, aŭ almenaŭ tiaj estas tre multaj. Mi ĝojas tion ke ili prenas la pacon ne kiel idealon en la ĉielo, sed kiel okulvideblan fakton sur la tero. Oni plurfoje diris kaj diras ke la pacismo en nia lando estas tro malstabila, ĉar la ideo ne staras sur la bazo de teruraj spertoj, ke la juna generacio baldaŭ cedos, se ili alfrontos kontraŭ severa realo. Mi tamen kredas ke ilia pacismo neniel cedos, ke ili neniel estos venkitaj pro la sama kaŭzo. Ili ne prenas la pacon por la idealo, do la paco estas por ili jam parto de la vivo mem, korpo kaj sango. Subfosi aŭ dubi la pacon kaj demokratismon por ili estas netolerebla krimo.

Kiam mi rigardas la preparitan bildaron, mi pripensas miajn infanojn kaj rememoras iliajn vortojn fojfoje ripetatajn ĉe ni, kaj iliajn rigardojn plenajn de riproĉoj kontraŭ la maljunulaj admonoj. Se mi permesus al mi diri tro banalajn esprimojn, la koloroj de haŭto aŭ de okuloj restas finfine nenio, nur supraĵa kaj malesenca; mi kredas ke ankaŭ ili amas la pacon kaj estimas la demokratismon el sia plej profunda koro, kaj ili estas pretaj en eventuala okazo bari intrigon peli la homaron al nuklea milito kaj dediĉos sin por la belo kaj bono, ĉar la paco kaj demokratio estas parto de ilia korpo mem, same kiel ĉe niaj filoj.

Ho, infanoj de la mondo, akceptu la saluton el Japanujo renaskita el la ruino de la atommilito. La estonto apartenas al vi.

☆ ☆ ☆

Al la supraj vortoj inspiris la esperantistan verkiston M. Miyamoto la unika fotolibro

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Eldonis BRUNA, Utrecht, Nederlando. 111 fotoj pri infanoj el la tuta mondo.

Prezo nur 2,95 gld. (11,80 steloj).

Ĉarmega donaco por ĉiaj okazoj!

Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam

BELARTO 1961

aperinta!

Redaktis ĝin WILLIAM AULD

Rapidu! Mendu ĝin tuj per la mendilo troviĝinta en la oktobra numero de "Esperanto".

Prezo nur 3.— gld (12 steloj) por ind. membroj de U.E.A.

Por nemembroj 3,50 gld. (14 steloj)

MODERNA NATURISMO

NUR por maturaj mensoj!

Informoj ĉe: INFE-sekretario Leif Heilberg,
1801 Page, San Francisco 17, Calif., Usono.

(Pagita reklamo)

FERMENTARIO

GRAVA VERKO DE UNIVERSALA VALORO
unu el la ĉefaj de la urugvaja pensulo
D-ro CARLOS VAZ FERREIRA

El la hispana lingvo tradukita de Prof. Manuel Fernández Menéndez kaj reviziita de Akademiano D-ro L. C. Porto Carreiro Neto kaj Prof. Ismael Braga.

Aldone biografio kaj portreto de la aŭtoro kaj antaŭparolo kaj glosareto de la tradukinto.

Volumo : formato 21 × 15; 264 paĝoj; bona papero; bone bindita per kartoneto kun bela kovrildesegno.

Jen kelkaj juĝoj aperintaj en la esperanta gazetaro : "FERMENTARIO'n oni povas rangigi inter la plej eminentajn verkojn de la mondliteraturo. Certe ĉiu esperantisto fieros posedi kaj ofte retralegi tiun majstroverkon". (**Kooperativismo**, Aŭg. 1960).

"Libro rekomendinda al seriozuloj kaj ŝatantoj de bona literaturo". (**Revue Française d'Espéranto**, Nov. 1960).

"Se Esperanto estas vere elitmovado, multaj studos la verkon de la granda urugvaja veremulo". (F. Szilagyi en **Norda Prismo**, N-ro 1.— 1961).

"Ni rekomendas la legadon al ĉiuj filozofemaj kamaradoj, al ĉiuj, kiuj serĉas ian "substancan" legaĵon". (N.B. en **Sennaciulo**, Nov. 1960).

"La verko estas skribita en tre bona kaj klara stilo, kaj ankaŭ la traduko estas bonega. Ĝi estas vere leginda, neniam laciga". (D-ro A. B. en **Interlingvistika Informa Servo**, Mart. 1961).

Prezo US \$ 2.00 (du dolaroj) afrankite

La libron liveras UEA, la diversaj libroservoj kaj la eldoninto

URUGVAJA ESPERANTO-SOCIETO
Calle Yaguarón 1397 - MONTEVIDEO (URUGVAJO)

Norda Prismo

kultura - socia - literatura

ilustrita revuo internacia -

kun kristala valoro

komencos sian okan jaron en 1962.

Ĉefredaktoro :

D-ro Ferenc Szilágyi

Döbelnsgatan 66

Borås (Svedlando) Tel. 244 22

Redaktoroj :

Baldur Ragnarsson

(Reykjavik, Islando)

Johan Hamond Rosbach

(Sarpsborg, Norvegujo)

Vilho Setälä

(Matinkylä, Finnlando)

Poul Thorsen

(Kopenhago, Danujo)

Jen unu letercitaĵo el la multaj : "Estas ĉiam ĝojiga momento, kiam alvenas via mirinde bela kaj tre interesa revuo." (C. H. el Clermont).

Abonanto, paganta antaŭ la 15-a de jan. 1962 (laŭeble tuj do) ĝuas favoron kaj pagas abonprezon de 10 sv. kr., t.e. 2 us. dol., 25 rk, 29 steloj. Poste oni pagas 12:- sv. kr., 2:50 us. dol., 35 st., 30 rk.

Administrejo : Barnhusg. 8. Stockholm

Vi ricevos por tiu ĉi prezo ses numerojn (5-fojojn) riĉenhavan, interesan revuon.

Abonojn peras ankaŭ UEA.

Eldonaĵoj de U.E.A.

Memorlibro

12,50 gld.; 50 steloj

Angla Antologio

10,— gld.; 40 steloj

Sekretoj de la Marestaĵoj

5,— gld.; 20 steloj

Mendu ĉe U.E.A. !

La nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande: Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio: 7 Av. Léon-Gourdault
Choisy-le-Roi (Seine) Francujo.

Administracio: 5 Bd. Stalingrad
Nice (A.M.)

LASTA MOMENTO

POR VARBI

Reklamojn

POR JARLIBRO 1962

Ni kalkulas je ĉies kunlaboro!

Moderna lernolibro de Esperanto

por la tuta mondo

Vilho Setälä:

Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Kun instrukcioj en multaj naciaj lingvoj

Prezo 10 steloj + sendkosto

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj
Svedujo : U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam.

HEROLDO

DE ESPERANTO

**LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA
ESPERANTO-ORGANO**

- aktualaj informoj pri la sukcesoj de Esperanto
- Esperanto-filmo
- interesaj variaj artikoloj

40 JAROJN DA TRADICIO

EK DE NUN:

20 NUMEROJ JARE

Nova redaktoro : Ada Fighiera-Sikorska

Abonebla ĉe la Landaj Asocioj aŭ ĉe U.E.A.

STAFETO

Eld. J. Régulo
anoncas du ĵusajn eventojn !

1

Dek diverslingvaj lingvistoj :

H. A. DE HOOG

S. LA COLLA

T. PUMPR

D. B. GREGOR

I. LAPENNA

R. SCHWARTZ

G. WARINGHIEN

K. KALOCSAY

T. MIKAMI

S. SONNENFELD

invitas vin al

pilgrimo al la fontoj

Akompanu ilin legante

LA ZAMENHOFA ESPERANTO

Simpozio pri -ata/-ita

338 paĝoj

Formato : 16 × 22,5 cm

Prezo : 3 usonaj dolaroj

2

Alian fonton de popola saĝo

vi malkovros

en la tiel longe elĉerpita

nun oportune reordigita

PROVERBARO ESPERANTA

de

L. L. ZAMENHOF

Alfabeto ordigita kaj provizita de

indeksoj analiza kaj sinteza de

Camille Rogister

Enkonduko de **Gaston Waringhien**

Prologoj de **M. F.** kaj **L. L. Zamenhof**

La librojn liveras Eldonisto J. Régulo, UEA kaj ĉiuj

Libroservoj de la Movado

Saĝiĝu malmultekoste!

Kunhelpu pluporti la torĉon!